V-19034/1971



# EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

7
1971

Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu! La proletaro kaj la subpremataj popoloj kaj nacioj de la tuta mondo, unuiĝu!

La danĝero de nova mondmilito ankoraŭ ekzistas, kaj la popoloj de ĉiuj landoj nepre devas sin prepari. Sed, nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio. Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn!

# Prezidanto Maŭ Ĝoje Celebras I
# Kune kun la Pekina Popolo




Vespere de la 1-a de majo, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ venas sur la pordegon Tian-anmen por ĝoje festi la tagon de unuiĝo kaj batalo de la tutmonda proletaro — la internacian laboristan tagon de "1-a Majo", kune kun laboristoj kaj laborantaj amasoj de Pekino kaj amikoj el la kvin kontinentoj de la mondo.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin rigardas artefajraĵojn sur la pordego kune kun Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj lia edzino.

# a Festan Tagon de "l-a Majo"
# ɔ kaj Alilandaj Amikoj







Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ viglopaŝe venas sur Tian-anme




n por festi la internacian laboristan tagon de "1-a Majo", kune kun la armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo.




La kamboĝa ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, lia edzino (maldekstre) kaj kamarado Dong Bivu sur Tian-anmen.



Kamarado Phoumi Vongvichit el L gardas artefajraĵojn.



Samdek Penn Nouth (meze), ĉefministro de la Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, kamaradoj Je Gianjing (dekstre) kaj Ĝu De kune rigardas artefajraĵojn.



La edzino de ĉefministro Penn No ŝeng.



aoso kaj kamarado Ĝoŭ Enlaj kune ri-



Kamarado Nguyen Duy Trinh (kun kaskedo), membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de LPV, vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj de la vjetnama registaro, sinjorino Vongvichit el Laoso (dekstre)kaj kamaradino Giang King sur Tian-anmen.



ıth (meze) kaj kamarado Huang Jong-



Kamarado V. G. Wilcox (la dua de maldekstre), ĝenerala sekretario de ia Komunista Partio de Novzelando, kaj kamarado Ĝang Ĉunkiaŭ (dekstre).



Thakin Ba Thein Tin (dekstre), vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Birmo, kaj kamarado Jaŭ Venjuan.



Princino Fatemeh Pahlavi de la Irana Fahian (maldekstre).




Jusuf Adjitorop (la dua de maldekstre), membro de PB de CK de la Komunista Partio de Indonezio, kamaradino Je Kjun, kamaradoj Li Deŝeng (maldekstre) kaj Vang Donghing (dekstre de la gasto).



Kapitano Charles Samba Sissoko (dek kooperado de Malio, kaj kamarado



ɩeĝlando (dekstre) kaj kamarado Vu



Sinjorino Leila Hoveyda (dekstre), edzino de la irana ĉefministro, sinjorino Rahim Khan, la edzino de aera marŝalo Abdul Rahim Khan, ĉefkomandanto de la pakistana aera armeo, kaj kamarado Li Hiannian.



e), ministro de eksteraj aferoj kaj
Zuopeng (maldekstre).



Robert Tiebile N'Daw (maldekstre), ministro de industria disvolvo kaj publika konstruo de Malio, kamaradoj Kiu Hujzuo (meze) kaj Gi Dengkuj.



Kamboĝaj kunbatalantoj kaj pekinaj revoluciaj amasoj ĝoje pasigas la internacian laboristan tagon de "1-a Majo".




Vjetnamaj kun

Pekinaj armea



Albanaj kunbatalantoj gaje partoprenas amuzan kunvenon en parko aranĝitan de pekinaj popolanoj.





namaj kunbatalantoj festas kune kun pekinaj laboruloj la internacian laboristan tagon de "1-a Majo".

‹inaj armeanoj kaj popolanoj okazigas amuzan kunvenon sur Kunming-lageto de la Somera Palaco.







Laosaj kunbatalantoj kaj aliaj fremdlandaj amikoj kune kun pekinaj popolanoj festas la majan tagon.





Vastaj amasoj de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj komunumanoj el pekina antaŭurbo celebras la internacian laboristan feston de "1-a Majo".

ĜONG HONG:

# Historia Turnopunkto

## —*Antaŭ kaj post Zunji-konferenco*

ZUNJI situanta norde de la provinco Gujĝoŭ en la sudokcidenta Ĉinio fariĝis fame konata urbo, pro tio ke ĝi strikte ligiĝis kun la historio de la ĉina revolucio.

En januaro de 1935, la Komunista Partio de Ĉinio okazigis tie plivastigitan konferencon de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio kun granda historia signifo. Tiu konferenco estis la plej granda historia turnopunkto por la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi frakasis la kriman regadon de la "maldekstrema" oportunismo de la renegata kliko de Vang Ming en la Partio dum la kriza momento de la ĉina revolucio kaj definitive starigis la gvidan pozicion de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la tuta Partio. De tiam, sub la direktado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, la ĉina revolucio marŝas senĉese de venko al pli granda venko.

### LA BRILAJ VENKOJ DE LA MILITA LINIO DE PREZIDANTO MAŬ

Antaŭ kaj post Zunji-konferenco, Ĉinio estis en la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito arde disvolviĝanta.

Aŭtune de 1927, Prezidanto Maŭ persone gvidis la aŭtunrikoltan leviĝon en la limregiono de Hunan kaj Gianghi, starigis la Ĉinan Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon kaj la unuan kamparan revolucian bazon de nia lando en Ginggang-montaro, Gianghi. De tiam, estis elhakita la revolucia vojo de mobilizo de amasoj en la kamparo por fari geriladon, disvolvi agraran revolucion, starigi kamparajn bazojn, sieĝi urbojn per kamparoj kaj fine kapti la urbojn, sub la gvido de proletara partio. Laŭ tiu ĉi brila vojo, la popola revolucia milito de Ĉinio disvolviĝis rapide. Tiu revolucia situacio kaŭzis ekstreman teruron al imperiismo kaj ĝia lakeo — Ĉiang Kajŝek-a reakciularo, kiu ĉiamaniere provis estingi la revoluciajn flamojn. De 1930 la lasta faris plurajn grandaskalajn ĉirkaŭekstermojn kontraŭ la revolucia bazo. Disvolviĝis senprecedence intensaj bataloj inter ĉirkaŭekstermoj kaj kontraŭ-ĉirkaŭekstermoj.

Por gvidi la revolucian militon al venko, la Komunista Partio de Ĉinio **"bezonas ne nur ĝustan marksisman politikan linion sed ankaŭ ĝustan marksisman militan linion"**. F. Engels diris: **"La emancipo de la proletaro havos sian specifan esprimon ankaŭ en militaj aferoj kaj kreos sian specifan novan militan metodon."** En la gvidado de revoluciaj militoj de la ĉina popolo, Prezidanto Maŭ ne nur difinis ĝustan politikan linion, sed ankaŭ genie kreis tute novan proletaran militan linion kaj kompleton da strategioj kaj taktikoj de popola milito, kaj per tio gajnis brilajn venkojn unu post alia en la kontraŭ-ĉirkaŭekstermoj.

Vintre de 1930, Ĉiang Kajŝek ekspedis 100,000 militistojn kaj lanĉis la unuan grandaskalan ĉirkaŭekstermon kontraŭ la centra revolucia bazo en Gianghi. Tiam la unua fronta armeo de la Ruĝa Armeo havis nur 40,000 homojn. Prezidanto Maŭ opiniis ke la Ruĝa Armeo ne devas fari mortan batalon kontraŭ la malamiko kaj nepre persisti en gerila milito kaj gerileca movada milito por plene disvolvi la potencon de popola milito, sub la kondiĉo ke la malamiko estas forta dum ni estas malfortaj. Laŭ la strategiaj dispozicioj de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo praktikis la principon "profunden



Kamarado Maŭ Zedong (en 1935)

enlogi la malamikon" kaj transmoviĝis al la meza parto de la centra bazo de Gianghi. Rezulte, enirinte en la bazon, la malamiko tuj dronis jam en la maro de popola milito. Unu divizio de la malamiko estis komplete ekstermita de la Ruĝa Armeo, kaj ankaŭ ĝia fronta ĉefkomandanto estis kaptita. La aliaj kolonoj de la malamiko ĥaose retiriĝis unu post alia kaj la Ruĝa Armeo gajnis du venkojn en kvin tagoj. Estis frakasita la unua ĉirkaŭekstermo de la reakciularo.

En aprilo de 1931, Ĉiang Kajŝek lanĉis la duan ĉirkaŭekstermon per 200,000 militistoj. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo aplikis la principon bati unue malfortan parton de la malamiko kaj poste ekstermi la aliajn partojn ĉiun aparte, tiel ke la Ruĝa Armeo unue ekstermis la plej malfortan kolonon de la malamiko, kaj en la sekvintaj 15 tagoj marŝis 700 liojn de suda Gianghi ĝis okcidenta Fugian, faris 5 batalojn ĉiujn finitajn kun venko kaj plensukcese frakasis la ĉirkaŭekstermon.

La reakciularo ne volontis akcepti sian malvenkon. En julio de 1931, Ĉiang Kajŝek mem elpaŝis kiel la ĉefkomandanto kun 300,000 militistoj kaj nombro da militaj konsilistoj el Germanio, Japanio kaj Britio, kaj tiel lanĉis la trian ĉirkaŭekstermon en pli granda skalo. Alfronte tian situacion, Prezidanto Maŭ decidis alpreni operacian principon **"eviti la ĉefajn fortojn de la malamiko kaj bati ĝiajn malfortajn partojn"** kaj rapide movis al la suda Gianghi la ĉefan forton de la Ruĝa Armeo, kiu disvastigis tiam la revolucian bazon en la okcidenta Fugian. Kiam la ĉefaj fortoj de la malamiko serĉis batalojn kun tiuj de la Ruĝa Armeo, densigante siajn trupojn por fari grandan sieĝon, la Ruĝa Armeo lerte evitis la malamikajn ĉeffortojn, rekte atakis ties postfronton kaj samtempe logis la malamikon al batalo per malgrandaj trupoj ŝajnigantaj sin kiel la ĉefaj fortoj. Kiam la malamiko tion rimarkis, la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo jam ripozis duonmonaton. Pro malsato, laciĝo kaj deprimiĝo, la malamika armeo vole nevole devis retiriĝi. La Ruĝa Armeo persekutis ĝin en venko, kaj la solide batita Ĉiang Kajŝek devis forkuri konfuzite al sia nesto.

Venkinte la trian ĉirkaŭekstermon, la Ruĝa Armeo ne nur reprenis sian antaŭan bazon, sed ankoraŭ multe disvolvis sian forton. En mallonga tempo, la Ruĝa Armeo en la tuta lando kreskis ĝis 300,000 personoj kaj la kamparaj bazoj disvastiĝis al pli ol 10 provincoj. En novembro de 1931, fondiĝis en Ĵujgin, Gianghi, la Centra Laborista-Kamparana Demokratia Registaro kun Prezidanto Maŭ kiel la ĉefo. La situacio de la ĉina revolucio estis senprecedence bonega.

La plej baza kaŭzo de tio ke la Ruĝa Armeo povis disvolviĝi de malgrandeco al grandeco, de malforteco al forteco kaj venki la potencan malamikon, kuŝis en tio ke la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo estis nova popola armeo, fondita laŭ la armeokonstrua penso de Prezidanto Maŭ kaj servanta al la popolo tutkore kaj tutanime sub la absoluta gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj praktikis la strategion kaj taktikon de popola milito. Ĝuste kiel la granda instruanto Lenin diris: **"Organizi la amasojn de la proletaro kaj la laborantan popolon ĉiam estas multe pli profunda kaj konstanta karaktero de revolucio kaj ĉiam estas kondiĉo de ĝia venko."** La Ruĝa Armeo starigis rilaton kun la popola amaso kiel tiu inter fiŝo kaj akvo kaj trovis ĝian amon kaj subtenon. Dank' al tio, dum batalado la Ruĝa Armeo povis sukcese ataki kaj defendi kaj ĉiam estis nevenkebla.

En la artikolo *Vivu la Venko de Popola Milito* Vicprezidanto Lin Biaŭ montris: "Kamarado Maŭ Zedong majstre resumis la strategion kaj taktikon de popola milito kiel jene: Vi batalas laŭ via maniero kaj ni laŭ la nia; ni batalas, kiam ni povas venki, kaj fortiriĝas, kiam venko ne eblas." En la longdaŭra revolucia milito de nia lando, nia popolo venkis la en- kaj ekster-landajn malamikojn ĝuste dank' al tiu granda strategia kaj taktika penso.

## LA BATALO INTER LA DU LINIOJ KAJ ZUNJI-KONFERENCO

Prezidanto Maŭ diris: **"La historio diras al ni, ke ĝusta politika kaj milita linio naskiĝas kaj disvolviĝas ne spontanee kaj trankvile, sed en batalado."**

En januaro de 1931, ĝuste kiam la revolucia milito de la ĉina popolo venke marŝis antaŭen, Vang Ming kaj lia bando uzurpis per intriga rimedo la centran gvidantecon de la Partio, sub la ŝildo de "reprezentantoj de la internacio". Ilia "maldekstrema" oportunisma linio konformis al la bezono de la klasaj malamikoj. Tio kaŭzis ke la Komunista Partio de Ĉinio alfrontis novan pli gravan batalon, post sia venko super la dekstrema oportunismo de Ĉen Duhiu kaj la "maldekstrema" oportunismo de Kju Kiubaj kaj Li Lisan.

Vang Ming kaj similaj plenforte oponis kontraŭ la politiko de Prezidanto Maŭ pri revolucia unuecfronto kaj pledis por faligi ĉiujn aliajn, staris kon-

traŭ la revolucia vojo de sieĝo de urboj per kamparo kaj erare postulis atakon kontraŭ grandaj urboj per la Ruĝa Armeo. En militaj aferoj, li mekanike aplikis la spertojn de pasintaj kaj fremdlandaj militoj kaj neis la proletaran militan linion de Prezidanto Maŭ, kaŭzante rapidan malboniĝon al la milita situacio. Dank' al la influo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ profunde radikiĝinta en la Ruĝa Armeo, tiu rifuzis la "maldekstreman" linion de Vang Ming, batalis ankoraŭ laŭ la militaj principoj de Prezidanto Maŭ kaj venke frakasis la kvaran ĉirkaŭekstermon fare de la malamiko. Dum la kvina ĉirkaŭekstermo, ĉar la provizora centra komitato de la Partio regata de la renegata kliko de Vang Ming jam translokiĝis de Ŝanhajo al la centra revolucia bazo en Gianghi, ili ekskluzivis la gvidon de Prezidanto Maŭ per malicaj rimedoj kaj devige efektivigis sian eraran linion en la Ruĝa Armeo kaj ĝiaj diversaj laboroj. En la armeokonstrua principo, tiu renegata kliko reduktis la tri taskojn de la Ruĝa Armeo al sola batalado. En milita problemo, ĝi neis la fakton, ke la malamiko estas forta dum ni malfortaj, kaj postulis aplikon de pozicia batalo kaj de "regula batalo", apogante sin sole sur la ĉefaj fortoj; ĝi postulis fari rapiddecidan militon strategie, kaj longdaŭran militon operacie, "atakon sur ĉiuj frontoj" kaj "frapadon per du pugnoj", ĝi oponis kontaŭ la principo enlogi profunden la malamikon, kalumniante necesan transmoviĝon kiel t. n. "retiriĝan forkurismon", kaj postulis fiksiĝon de militfronto kaj absolute koncentritan komandon. Unuvorte, ĝi neis geriladon kaj gerilecan movadmiliton kaj tiel neis popolan militon en tuto.

En oktobro de 1933, la reakciularo ekspedis milionon da militistoj por lanĉi la kvinan ĉirkaŭekstermon. Komandante blinde, la renegata kliko de Vang Ming dekomence efektivigis aventurismon en ofensivo, elmetis la eraran principon "kontraŭbatali la malamikon ekster la teritorio", kaj sendis ĉefan forton de la Ruĝa Armeo por ataki la fortikigitajn poziciojn en la regiono de Kuomintango. Post la fiasko de la ofensivo, ĝi teruriĝis de la malamiko kaj klopodis savi sin per konservativismo, dividante la trupojn por pasive defendi ĉiujn enirejojn kaj fari pozician batalon kontraŭ la malamiko, kaj tiel metis la Ruĝan Armeon en pasivan pozicion.

Tiutempe, la japana imperiismo jam invadis nian nordorientan teritorion, kaj nia lando kaj nacio estis en kriza momento de vivo aŭ morto. Neante la realan staton, ke la kontraŭdiro inter la nacioj jam fariĝis la ĉefa kontraŭdiro kaj diversaj socitavoloj en la lando havis ĝeneralan postulon de rezisto kontraŭ la japana imperiismo, Vang Ming kaj similaj rifuzis unuiĝi kun la 19a-voja armeo de Kuomintango kaj rigardis ĝin kiel la "plej danĝeran malamikon", malgraŭ ke la lasta reprezentis la forton de la ĉina nacia burĝaro, pledis por rezisti kontraŭ la japana imperiismo kaj oponis kontraŭ Ĉiang Kajŝek. Kiam la kuomintangaj trupoj de Ĉiang Kajŝek atakis la 19a-vojan armeon, Vang Ming persistis en sia milita konservativismo kaj ne ekspedis trupojn por helpi la lastan, tiel ke Ĉiang povis koncentri sian tutan forton por ataki la centran bazon post subpremo al la 19a-voja armeo. La brava Ruĝa Armeo faris unujaran sangan batalon, kaj ĝi kvankam akiris iujn venkojn en apartaj bataloj, tamen, neniam sukcesis rompi la ĉirkaŭekstermon pro la eraro de la gvida linio. Rezulte de tio, ju pli longe batalis la Ruĝa Armeo, des pli malmultiĝis ĝiaj personoj kaj malgrandiĝis ĝia bazo. En la fino ĝi ne povis ne evakui la centran revolucian bazon kaj komencis la grandskalan strategian transmoviĝon — la Longan Marŝon.

En la komenca periodo de la Longa Marŝo, la renegata kliko de Vang Ming praktikis dekstreman forkurismon, kio kaŭzis pezan perdon al la Ruĝa Armeo en trarompo de la sieĝo, tiel ke reduktiĝis ties personaro de 100,000 al 30,000. Tiutempe, Ĉiang Kajŝek koncentris centmilojn da militistoj en la okcidenta parto de Hunan-provinco, kiuj pretis ĉirkaŭekstermi nian armeon. Se la Ruĝa Armeo ne rezignus la antaŭe fiksitan operacian projekton, ĝi devus sub ekstreme malfavoraj kondiĉoj fari decidan batalon kun la malamika armeo supera en forto kaj tiel riskus kompletan pereon.

En tiu kriza momento de revolucio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kune kun komandantoj kaj batalantoj de la Ruĝa Armeo faris firman batalon kontraŭ Vang Ming kaj similaj. Laŭ la dispozicioj de Prezidanto Maŭ, la Ruĝa Armeo tuj ŝanĝis sian vojlinion, fore de la danĝera regiono, kaj marŝis en Gujĝoŭ-provincon, kie mankis fortaj trupoj de la malamiko.

En januaro de 1935, la Ruĝa Armeo okupis la urbon Zunji, sub la gvido de Prezidanto Maŭ la partia centro kunvokis plivastigitan konferencon de la Politika Buroo de la Centra Komitato. La konferenco koncentris sian forton por korekti la

militajn kaj organizajn erarojn, kiuj havis decidan signifon siatempe, kaj ĝisfunde kritikis la "maldekstreman" oportunismon kaj la militan linion de Vang Ming. Ĝi denove konfirmis la ĝustecon de la milita principo de Prezidanto Maŭ **"Kiam la malamiko antaŭeniras, ni retiriĝas; kiam ĝi kampadas, ni ĝin ĝenas; kiam ĝi lacas, ni ekatakas; kiam ĝi retiriĝas, ni persekutas"**, reorganizis la centran sekretariaron kaj la centran revolucian komisionon de militaj aferoj de la Partio, eksigis la renegaton Vang Ming el la gvida ofico kaj formis novan gvidantaron de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la ĉefo, unuigante la tutan partion kaj la Ruĝan Armeon kaj turnante la linion de la Partio sur la ĝustan trakon de Marksismo kaj Leninismo. De tiam **"la Partio surpaŝis la vojon ĝisfunde bolŝevikecan"**. Zunji-konferenco certigis la gvidan pozicion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la tuta Partio kaj en la kriza momento savis la Partion, la Ruĝan Armeon kaj la revolucion el danĝero. En la akra kaj komplika batalo inter la du linioj, ĉu dum Zunji-konferenco aŭ antaŭ kaj post la konferenco, Vicprezidanto Lin Biaŭ ĉiam staris firme ĉe la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, faris senŝanceliĝan kaj sencedan batalon kontraŭ la erara linio kaj ludis ekstreme gravan rolon por likvidi la regadon de la oportunismo kaj certigi la gvidan pozicion de Prezidanto Maŭ en la tuta Partio kaj por defendi lian revolucian linion. Li ĉiam estas la plej intima kunbatalanto de Prezidanto Maŭ.


## LA LUMO DE ZUNJI-KONFERENCO

Zunji-konferenco portis al la Ruĝa Armeo novajn esperon kaj kuraĝon. Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, ĝi aperis sur la batalkampo kun tute nova spirito kaj reakiris la aktivecon en la milito. Laŭ la militaj principoj de Prezidanto Maŭ kaj per elastaj strategio kaj taktiko, ĝi rebatis la persekutantajn malamikajn trupojn en nombro de centmiloj, metante ilin en embarason.

Post Zunji-konferenco, la Ruĝa Armeo tuj turniĝis okcidenten kaj sin preparis por transpasi Jangzi-riveron. Ĉiang Kajŝek haste sendis trupojn tien por bari la transiron. Sed la Ruĝa Armeo subite sin direktis orienten, postlasante la malamikon kaj refoje konkeris Zunji kaj la pasejon Loŭŝanguan. Post intensaj bataloj ĝi ekstermis 20 malamikajn regimentojn postsekvantajn. Tio estis la unua granda venko de la Ruĝa Armeo ekde la Longa Marŝo.

Post ripozo, reordigo kaj plenigo, la Ruĝa Armeo denove iris okcidenten, Ĉiang Kajŝek konjektis ke ĝi volas ree transpasi Jangzi-riveron, kaj haste kolektis siajn trupojn por defendi la pramejojn laŭ la rivero. Sed la Ruĝa Armeo subite returnis kaj transpasis la riveron Vugiang en sudo, sin ŝajni-

*La domo de Zunji-konferenco*





*Heredante la gloran tradicion de la Ruĝa Armeo peneme lukti en malfaciloj, la komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de ĈPLA garnizonanta en Zunji ĉiuj ellernis la arton plekti sandalojn.*

gante ataki Gujjang. Kiam Ĉiang Kajŝek movis siajn trupojn el Junnan-provinco por helpi Gujjang, la Ruĝa Armeo ĉirkaŭiris Gujjang kaj iris sudokcidenten en Junnan, sin puŝante al la urbo Kunming. La malamiko en Junnan haste kolektis ĉiujn siajn trupojn en la provinco por defendi la urbon. Sed la Ruĝa Armeo faris nur falsan atakon ĉe Kunming, kaj rapide antaŭenmarŝis al la rivero Ginŝa en nordokcidento kaj postlasis la centmilojn da malamikaj militistoj je granda distanco. Kiam la malamiko alrapidis en granda nombro, la Ruĝa Armeo jam iris for trans la rivero Ginŝa, tute liberiĝinta de la persekutado, kaj tiel akiris decidan sukceson en la Longa Marŝo.

Transpasinte la riveron, la unua fronta armeo de la Ruĝa Armeo daŭre marŝis norden kaj transpasis la naturan danĝeran pasejon, riveron Dadu, la ĉiam neĝkovratan montaron Giagin kaj renkontiĝis kun la kvara fronta armeo en la okcidenta parto de Siĉuan-provinco je junio de 1935.

Post la renkontiĝo, la Partio kunvokis konferencon de la Politika Buroo, kiu analizis la ĉiaman pliserioziĝon de la nacia kriza situacio pro la pliintensa agresado de la japana imperiismo al Ĉinio, kaj decidis ke la Ruĝa Armeo daŭrigu sian marŝon al nordo por rezisti kontraŭ la japana imperiismo.

La Ruĝa Armeo trapaŝis la vastan marĉan herbejon kaj la naturan danĝeran pasejon Lazikoŭ, venkinte sennombrajn malfacilojn kaj danĝerojn. En oktobro de 1935 ĝi venke alvenis al norda Ŝenhi-provinco. Post unu jaro, ankaŭ la dua kaj kvara frontaj armeoj venke venis tien kaj renkontiĝis kun la unua fronta armeo de la Ruĝa Armeo.

De tiam la ĉina revolucio eniris novan etapon. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, prenante la nordŝenhi-an bazlokon kiel la centron, la ĉina popolo sin preparis por renkonti la altan tajdon de la nacia revolucia movado de la tuta lando kontraŭ la japana agreso.

SONG GE:

# Ĉiam Brilas la Spirito de Jan-an

JAN-AN situas sur la loesa altebenejo de la norda parto de Ŝenhi-provinco.

En oktobro de 1934, sub gvido de la granda gvidanto de nia popolo Prezidanto Maŭ la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo ekmarŝis de Gianghi kaj Fugian, kontinue iris 25,000 liojn tra 11 provincoj kaj sukcese atingis la revolucian bazon en norda Ŝenhi en oktobro de 1935.

Prezidanto Maŭ batalis kaj vivis 13 jarojn en norda Ŝenhi, interalie 10 jarojn kaj tri monatojn en Jan-an. En la 7-a de januaro de 1937, Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio venis en Jan-an kaj tiam ĝi fariĝis la centro direktanta la ĉinan revolucion kaj revolucia sanktejo sopirata de la popolo.

Sub gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio en Jan-an, la ĉina popolo heroe batalis ok jarojn, venkis la japanan imperiismon kaj akiris la finan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ekde 1946, sub gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio la ĉina popolo brave batalis tri jarojn kaj akiris la grandan venkon de la Popola Liberiga Milito, kaj tiel finis la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo en Ĉinio kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Popola Liberiga Milito, per siaj sango kaj vivo la popolo de Jan-an, kune kun la popolo de la tuta lando, faris neniam forgeseblan kontribuon al la liberiga afero de la ĉina popolo. Hodiaŭ, 1,200,000 heroaj gefiloj de Jan-an-regiono, harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, atingis brilan sukceson en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, disvolvante la jan-an-an spiriton de sinapogo sur propraj fortoj, penema luktado en malfaciloj kaj ĝisfunda revoluciado.

## ĈIAM TENI LA STILON DE PENEMA LUKTO EN MALFACILOJ

En sia responda telegramo al la popolo de Jan-an kaj la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono je la 26-a de oktobro de 1949, Prezidanto Maŭ diris: **"Jan-an kaj la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono estis, en la periodo de 1936 ĝis 1948, la sidejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉefa postfronto de la liberiga batalo de la ĉina popolo. La popolo de Jan-an kaj la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono faris grandan kontribuon al la popolo de la tuta lando. Mi deziras kun gratulo, ke la popolo de Jan-an kaj la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono daŭre unuiĝu unuanime por rapide kuraci la vundojn kaŭzitajn de la milito kaj disvolvi la konstruadon ekonomian kaj kulturan. Kaj mi esperas, ke ĉiuj revoluciaj laborantoj de la tuta lando ĉiam tenos la stilon de penema lukto en malfaciloj, kiun havis la laborantoj en Jan-an kaj la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono en la pasintaj pli ol dek jaroj."** La partia organizo kaj popolo de Jan-an-regiono persiste metis vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso sur la unuan lokon, precipe de 1970 ili diligente studas la brilan respondan telegramon de Prezidanto Maŭ, kaj faras grandskalan naturŝanĝan batalon en agrikultura fronto. Ili pentras belan bildon sur la areo




*La komitatanoj de la partia filio de la Liulina Produkta Brigado modeste aŭskultas opiniojn de la amaso.*

de 35,700 kvadrataj kilometroj de Jan-an, kondukante akvon tra montoj kaj kreante kampojn en montaro.

Kaj Nannivan-komunumo, kiu troviĝas pli ol 50 kilometrojn for de Jan-an, estas unu el la avangardaj kolektivoj.

Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj precipe dum la periodo de 1940 ĝis 1941, la milita sieĝado kaj ekonomia blokado fare de la japana imperiismo kaj kuomintangaj reakciuloj kaj atakoj de naturaj katastrofoj alportis ekstreme gravajn malfacilojn al la liberigita regiono. En 1942, respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ **"eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj"**la komandantoj kaj batalantoj de la 359-a brigado de la Okavoja Armeo, kun pafilo en unu mano kaj pioĉo en la alia, kulturebligis grandajn pecojn da virga tero ĉe la dornoplena Nannivan en bonajn kampojn, konstruis fabrikojn kaj produktis grandan kvanton da greno, kaj tiel faris gigantan kontribuon por la frakaso de la agreso de la japana imperiismo kaj la blokado de la kuomintangaj reakciuloj. De tiam Nannivan vaste konatiĝis kiel riĉa loko en norda Ŝenhi.

Forpasis pli ol 20 jaroj. Hodiaŭ, Nannivan-areo konstruiĝis en ankoraŭ pli belan kaj riĉan lokon.

Nannivan-popolkomunumo estas la loko, kie la 359-a brigado kulturebligis virgan teron kaj entreprenis produktadon. Hodiaŭ, tie konstruiĝis vico post vico da novaj tegoltegmentaj domoj, inter ili sin trovas butikoj, banko, hospitalo, lernejoj, maŝinriparejo, elektrejo ktp. Krom milion, maizon kaj tritikon, la komunumanoj de Nannivan kulturas ankaŭ rizon kaj aliajn plantojn.

Por disvolvi kulturadon de rizo en la valo de Nannivan, antaŭ ĉio oni devis solvi la malfacilon de manko de akvo. La popolo de Nannivan energie kondukis akvoutiligan konstruadon. Nur en kelkaj monatoj de 1970, la amasoj de la komunumo jam sukcesis konstrui 10 grandajn digojn, ses irigaciajn kanalojn kaj la areo de la irigaciataj kampoj konstruitaj en tiu jaro superis la totalan areon de tiuj konstruitaj en la antaŭaj pli ol 20 jaroj post la Liberiĝo. En la jaro 1970, Nannivan suferis seriozajn katastrofojn de prujno, inundo kaj hajlo, sed la vastaj amasoj de Nannivan-komunumo venkis ilin sin apogante sur la jan-an-a spirito

kaj sukcesis plialtigi la produktokvanton de greno je pli ol 30 pocentoj kompare kun tiu de la riĉrikolta jaro 1969.

### ANTAŬIRANTO EN DISVOLVO DE LA REVOLUCIA TRADICIO

Sub la instruo de Prezidanto Maŭ **"disvolvi la revolucian tradicion por akiri pli grandan honoron"**, la revoluciuloj de la malnova generacio de la regiono de Jan-an daŭre batalas sur la fronto de la tri revoluciaj movadoj kun plena vigleco kaj konservas revolucian junecon. Kaj Jang Buhaŭ, kiu partoprenis la Kongreson de Laboraj Herooj en la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono persone kunvokitan de Prezidanto Maŭ en jaro 1943, estas unu el ili.

Jang Buhaŭ estas malnova partiano, kiu aliĝis al la Partio en 1936. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, li firme efektivigis la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj"**, kaj produktis multe da milio por la fronto per pioĉo kun pezo de 2 kilogramoj kaj estis plurfoje akceptita kaj laŭdita de Prezidanto Maŭ. Hodiaŭ, kvankam li jam aĝas je pli ol 60 jaroj, sed post kiam Prezidanto Maŭ publikigis la brilan "Instrukcion de la 7-a de Majo", li tuj eniris en la lernejon "7-a de Majo" ŝultroportante siajn litaĵojn kaj pioĉon, kaj meminiciate prenis sur sin la taskon de paŝtisto. Ĉiutage, kun blanka tuko ĉirkaŭ la kapo kaj vipo en la mano li paŝtadas ŝafaron transgrimpante monton post monto, de frosta mateno kun prujno ĝis apero de roso en malfrua vespero. Li trairis ĉiujn lokojn sur ambaŭ bordoj de Janhe-rivero, kun paro da multfoje flikitaj ŝuoj sur la piedoj.

Lu Hjongking, vicestro de la taĉmento por baza konstruado de Hinŝenggu-brigado de Janĉuan-

*Por altigi sian konscion de daŭra revoluciado, membroj de la partia komitato de iu trupo de ĈPLA studas verkojn de Marks, Lenin kaj Prezidanto Maŭ, en la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ ĉe Zaŭjuan.*





*La maljuna labora heroo Jang Buhaŭ*

gubernio en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito partoprenis la Kampanjon ĉe Pinghingguan, kiun persone direktis Vicprezidanto Lin Biaŭ. En la milita tempo, li dufoje vundiĝis kaj tamen ne forlasis la fronton. Kvankam kripla, hodiaŭ li tamen havas fortan volon kaj ludas elstaran rolon en baza konstruado.

Ankaŭ onklino Han Gujjing de Zaŭjuan-brigado de Jan-an kun aĝo de pli ol 60 jaroj estas multe laŭdata. Ŝi naskiĝis en familio de malriĉa kamparano. En la pasinta jan-an-a produkta movado, ŝi plurfoje ricevis la honorajn titolojn "Modelo en Subteno al la Fronto" kaj "Labora Modelo" kaj la Centra Komitato de la Partio premiis ŝin per ŝpinrado; kiam Prezidanto Maŭ faris la alvokon **"organiziĝu"** ŝi firme iris la vojon de kolektivigo kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Zaŭjuan. Kvankam ŝi jam maljuniĝis, ŝi tamen ne volas sidi senfare kaj ĉiutage ŝi aktive partoprenas laboron tutkore servante al la kolektivo. Ŝi ofte petas ke la brigado juĝu al ŝi malpli multe da laborpoentoj. Informiĝinte, ke intelektaj gejunuloj venos al Zaŭjuan por ricevi reedukadon, ŝi memkonscie prenis sur sin la laboron de akceptado. Ŝi muelis farunon kaj hejtis terlitojn por ili kaj traktis ilin kiel siajn proprajn gefilojn. En la lastaj jaroj, ŝi pendigis surmure en sia domo la de ŝi ricevitan premian atestilon kun la surskribo "homo aĝa, koro ruĝa", por stimuli sin daŭre revolucii kaj senĉese kontribui sian forton por la Partio kaj por la popolo.

## LA JAN-AN-A SPIRITO ELKULTURAS NOVAJN HOMOJN

Ho, Jan-an, kiom da revoluciaj gejunuloj vi altiris al vi! Antaŭ pli ol 30 jaroj, por serĉi la revolucian veron miloj kaj miloj da revoluciaj gejunuloj venis al Jan-an, trarompinte unu post alia blokadojn de la kuomintangaj reakciuloj kaj transirinte montojn kaj riverojn por studi Maŭzedongpenson kaj lerni teorion kaj metodojn de rezistado kontraŭ la japanaj agresantoj por savo de la nacio. Ili disportis al diversaj lokoj de la tuta lando la brilan strategian penson de Prezidanto Maŭ starigi revoluciajn bazlokojn en la kamparo, sieĝi la urbojn per la kamparo kaj fine kapti la urbojn kaj la tri efikajn armilojn: nome konstruo de la Partio, armita batalo kaj unueca fronto. Multaj el ili kreskis en elstarajn proletarajn revoluciulojn kaj faris gigantajn kontribuojn al la liberiga afero de la ĉina popolo. En sia artikolo *La Direkto de la Junula Movado*, Prezidanto Maŭ alte taksis ilin, montrante: **"La junula movado en Jan-an estas la modelo por la junula movado tra la tuta lando. Kaj ĝia direkto fakte estas la direkto de la junula movado de la tuta lando."** Tiutempe, ankaŭ junaj ĉinaj esperantistoj sin ĵetis en la revolucian torenton (en la 1-a n-ro de 1970 de nia gazeto ni aperigis la artikolon *En la Tagoj Kiam Ni Okupiĝis pri Esperantaj Laboroj en Jan-an*, kiu priskribas la historian fonon de la vortoj de Prezidanto Maŭ skribitaj al la esperanta ekspozicio aranĝita de la jan-an-aj esperantistoj). Kaj nun pli ol 20,000 pekinaj intelektaj junuloj venis al Jan-an por ludi rolon de freŝaj fortoj en la tri grandaj revoluciaj bataloj, nome klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj skribas novan ĉapitron de la jan-an-a junula movado.

Veturante de Tongĉuan de Ŝenhi-provinco al Jan-an, la pekinaj intelektaj junuloj devis transveturi Giezi-riveron en Luoĉuan-gubernio. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, norde de la rivero estis la fame konata revolucia bazloko la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono kaj sude de ĝi estis la regiono dense punktita per redutoj kaj gardataj pasejoj sub la reakcia regado de Kuomintango. Por lerni la veron pri rezistado kontraŭ la japana agreso por nacisavo kaj pri la liberigo de



*La veterana batalanto de la Ruĝa Armeo Haŭ Ĝihu*

la homaro, granda nombro da junuloj irantaj al Jan-an devis trarompi la lastan "militan blokadan linion" de la malamiko. En tiu loko, nemalmultaj junuloj estis barbare forkaptitaj kaj ĵetitaj de la reakciuloj en koncentrejon kaj iuj estis buĉitaj de ili.

Hodiaŭ tiu vojo jam fariĝis tute libera. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Jan-an rigardis la akcepton de la intelektaj junuloj venintaj de apud Prezidanto Maŭ kiel tre ĝojindan aferon. Tamtamante kaj tamburante ili varme bonvenigis la junulojn en la stratoj feste ornamitaj. Post kiam la lastaj venis en la vilaĝon, multaj veteranaj ruĝgvardianoj, vilaĝaj kadroj kaj estrinoj de la Virina Asocio por Nacisavo rakontis al ili la grandan revolucian praktikadon de Prezidanto Maŭ en norda Ŝenhi, uzante siajn travivaĵojn kiel ekzemplojn; ili gvidis la junulojn viziti la lokojn, kie Prezidanto Maŭ batalis kaj vivis siatempe, zorgeme faris al ili edukon de la revolucia tradicio ĉe Zaŭjuan, kie Prezidanto Maŭ faris la paroladon *Servu al la Popolo*, ĉe Ĝiluoĝen, kie Prezidanto Maŭ persone direktis la batalon, kaj ĉe Janggialing, kie Prezidanto Maŭ faris la paroladon *La Direkto de la Junula Movado*. Ĉe Zaŭjuan, Lej Ĝifu, sekretario de la partia filio de la produkta brigado, diris al la junuloj antaŭ la kavernodomo en kiu iam loĝis Prezidanto Maŭ, ke Prezidanto Maŭ skribis dekojn da brilaj artikoloj en tiu simpla kavernodomo kaj faris per tio grandan kontribuon al la ĉina revolucio; antaŭ la iama loĝejo de Prezidanto Maŭ ĉe Vanggiaping, veterana batalanto de la Ruĝa Armeo Haŭ Ĝihu detale rakontis al la junuloj, kiel Prezidanto Maŭ instruis sian filon kamaradon Maŭ Anjing, kiu ĵus revenis diplomiĝinte en universitato de fremda lando, ke li iru al kamparo — "Labora Universitato". La junuloj forte kortuŝiĝis de tio.

Sub la edukado kaj zorgado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Jan-an, la intelektaj junuloj kreskas ĉe la revolucia sanktejo. Nun, nemalmultaj intelektaj junuloj ne nur ellernis dekojn da terkulturaj laboroj kiaj plugado, vektoportado, sterkado, sarkado de kampoj, kulturado de legomoj, sed ankaŭ, pli grave, forĵetis siajn fieremon, dorlotiĝemon kaj luksemon kaj ekhavigis al si per hardado la revolucian spiriton de penema batalado kaj laborado.

Kiam Giaŭ Hiaŭĝen, kiu vivis en urbo de sia infanaĝo, venis al Jan-an kaj fiksloĝiĝis en produkta brigado en valeto, ŝi longe ne povis kvietigi sian emociitan koron. Ŝi pensis, ke antaŭ pli ol tridek jaroj, ŝia patro ĝuste en ŝia aĝo kaj en tia valo

*Lej Ĝifu, sekretario de la partia filio de la Zaŭjuan-a Produkta Brigado*





*Sub la piedo de la Pagoda Monto pekinaj intelektaj junuloj gaje interbabilas pri sia ricevo de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*


suriris la vojon de kombiniĝo de intelektulo kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, persone aŭskultis la paroladojn de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj *Pri Praktiko* kaj kreskis en la revolucia sanktejo en firman proletaran revolucian batalanton. Ŝi memoris, ke ŝia patro foje kaj refoje kuraĝigis ŝin antaŭ ŝia veno al Jan-an, dirante: "Aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ, iru la revolucian vojon kaj daŭrigu la revoluciadon." Pensante pri tio, ŝi pleniĝis de profunda amo al la montoj kaj riveroj, al ĉiuj herboj kaj arboj de Jan-an. Ŝi firme decidis modeste lernadi de la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj hardi sin en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. De tiam, ŝi entuziasme sin ĵetis en la ardan batalan vivon. Antaŭ nelonge, ŝi glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

De pli ol du jaroj, la intelektaj junuloj kiuj venis al la kamparo en la regiono de Jan-an por fiksloĝiĝi, sane kreskas sub la nutrado de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj reeduko de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj en la tri grandaj revoluciaj movadoj en la kamparo. Ĝis la fino de 1970, ĉirkaŭ cent el ili jam glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, pli ol 600 aliĝis al la Komunisma Junulara Ligo, pli ol 7,000 estis elektitaj kiel aktivuloj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, pli ol 2,600 fariĝis kadroj, konservistoj aŭ registristoj de laborpoentoj de produktaj brigadoj kaj grupoj kaj pli ol 1,000 fariĝis "nudpiedaj" kuracistoj kaj instruistoj de popolaj lernejoj.

En la tridekaj jaroj, la revoluciuloj de la malnova generacio en Jan-an pasigis la militajn jarojn firme sekvante Prezidanton Maŭ kaj ĉiam konservas sian revolucian junecon en la socialisma revolucio. Kaj hodiaŭ, nova generacio de revoluciaj junuloj de Jan-an sane kreskadas daŭrigante la tradician spiriton de Jan-an.


# 50 Jaroj de Batalo

—Pri la sanktaj lokoj de la ĉi



## kaj Venko

a revolucio





### Ŝaŭŝan

Ŝaŭŝan — la naskiĝa loko de la fondinto de la Komunista Partio de Ĉinio kamarado Maŭ Zedong. De februaro ĝis aŭgusto de 1925, li persone mobilizis kaj gvidis la kamparanan movadon de Ŝaŭŝan kaj fondis tie la plej fruan kaj firman partian filion en la kamparo de Ĉinio.


万岁！ 万万岁！
毛主席语录
正确的政治的和军事的路线，不是自然地平安地产生和发展起来的，而是从斗争中产生和发展起来的。






## La naskiĝa loko de la Komunista Partio de Ĉinio (maldekstre)

La unuan de julio 1921, la komunistaj grupoj en diversaj lokoj de nia lando sendis 12 reprezentantojn al Ŝanhajo por okazigi la unuan kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio en la domo (siatempe) n-ro 78, Hingje-strato, kiun partoprenis kamarado Maŭ Zedong. Dum la irado, la kongreso transiris al la lago Nanhu en Giahing, Ĝegiang, por eviti traserĉon fare de la malamiko. La kongreso pasigis la unuan partian statuton kaj elektis la centran organon de la Partio kaj tiel fondiĝis la Komunista Partio de Ĉinio.



伟大的中国共产党万岁！
伟大的领袖毛主
毛主席语录
领导我们事业的核心力量是中国共产党。
指导我们思想的理论基础是马克思列宁主义。
毛主席语录
中国共产党是全中国人民的领导核心。没有这样一个核心，社会主义事业就不能胜利。



## La Instituto de Kamparana Movado de Kantono (supre)

En 1926 kamarado Maŭ Zedong fondis en Kantono instituton de kamparana movado, iu estis revolucieca lernejo kulturanta kadrojn por kamparana movado. El la revolucia ajrosemo persone bruligita de kamarado Maŭ Zedong leviĝis granda kampara revolucio un Hunan kiel la centro, kiu impetis tiel rapide kaj forte kvazaŭ uragano kaj pluvego kaj etruis komplete la privilegiojn de la feŭda bienularo reginta dum jarmiloj.









## Ginggang-montaro — la Revolucia Bazo

En 1927 kamarado Maŭ Zedong persone gvidis en Hunan la Aŭtunrikoltan Leviĝon kaj la grandan militiron al Ginggang-montaro, kreis kaj kulturis la unuan tute novan popolan armeon, fondis revolucian bazon en Ginggang-montaro kaj tiel elhakis la brilan vojon de sieĝo de urboj per kamparo por fine kapti la urbojn.




古田会议永放光芒



## La okazejo de Gutian-Konferenco


En decembro 1929, okazis en Gutian de Fugian-provinco la 9-a partia kongreso de la 4-a korpuso de la Ruĝa Armeo, por kiu kamarado Maŭ Zedong verkis la rezolucian projekton "Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio", kiu resumis la riĉan batalsperton de nia partio kontraŭ la burĝara milita linio dum la komenca periodo de nia armea konstruado kaj bazis la konstruadon de la Ruĝa Armeo tute sur Marksismo-Leninismo.


伟大的領袖毛主席

## La okazejo de Zunji-Konferenco

En januaro 1935, okazis la plivastigita konferenco de la Politika Buroo de la Partio, kiu starigis novan gvidan centron de la Partio kun kamarado Maŭ Zedong kiel la ĉefo kaj finis la eraran gvidon de la "maldekstra" oportunismo. Ekde tiam, la ĉina revolucio marŝis de venko al venko.






## Jan-an

La Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo faris longan marŝon de 25,000 lioj kaj venk danto Maŭ translokiĝis kaj la Centra Komitato de la Partio instaliĝis en Jan-an, kiu de tiam fa tato de la Partio gvidis la tutlandan popolon al la venko super la japana imperiismo kaj al la

En 1945 ĉi tie estis kunvokita la sepa kongreso de la Partio, kiu estis kongreso de unuiĝo



atingis la revolucian bazon de norda Ŝenhi je oktobro 1935. Post nelonge, Prezi-
iĝis la gvida centro de la ĉina revolucio. De tie Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komi-
aligo de la kuomintanga reakciularo kaj liberigis la tutan landon.

:aj venko.




## Pekino

Je la 1-a de oktobro 1949, Prezidanto Maŭ solene deklaris la fondiĝon d
Partio okazis unu post alia en Pekino. Nia popolo kompakte unuiĝis ĉirkaŭ
vicestro, kaj brave marŝas antaŭen, alte tenante la standardon de unuiĝo ka




la Ĉina Popola Respubliko sur la pordego Tian-anmen en Pekino. Ankaŭ la 8-a kaj 9-a kongresoj de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kiel la venko de la 9-a kongreso de la Partio!

GIN HONG:

# La Viglecplena Partia Filio de Daĝaj

DAĜAJ estas ruĝa flago sur la agrikultura fronto de nia lando. De pluraj jaroj iuj fremdlandaj amikoj vizitantaj nian landon restigis siajn amikecajn piedsignojn sur la tero de Daĝaj, kaj ankaŭ nemalmultaj amikoj nevojaĝintaj al nia lando legis artikolojn pri laŭdindaj aferoj de Daĝaj sur nia gazetaro. Tial la nomo de Daĝaj kaj admirindaj faroj de Daĝaj-anoj ne estas fremdaj por multaj alilandaj amikoj.

En 1964, la granda gvidanto de nia popolo Prezidanto Maŭ alvokis **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"**, kaj per tio montris al niaj kamparanoj la direkton por konstrui novan socialisman kamparon. En la lastaj jaroj la revolucia spirito de la Daĝaj-anoj sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj stimulas centmilionajn ĉinajn kamparanojn firme iri sur la socialisma vojo, kaj vilaĝoj de Daĝaj-tipo jam aperis grandnombre en nia lando.

Ke Daĝaj fariĝis modelo sur la agrikultura fronto de nia lando, estas neeble sen gvido de la partia filio de Daĝaj, kun kamarado Ĉen Jongguj kiel la sekretario. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la partia filio de Daĝaj gvidis la vastajn amasojn de komunumanoj en persistado en la principoj komandi ĉion per la proletara politiko kaj meti Maŭzedongpenson sur la unuan lokon, en la spirito sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj, kaj en la komunisma stilo amzorgi ŝtaton kaj kolektivon, kaj fariĝis viglecplena avangarda organizo.

## KRESKI EN LA KLASBATALO

La partia filio de Daĝaj naskiĝis en la movado de la agrara reformo en 1947. De post sia naskiĝo, firme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **"organiziĝu"**, ĝi gvidis Daĝaj-anojn decideme iri la socialisman vojon de agrikultura kolektivigo — de la interhelpa grupo kaj kooperativo ĝis la nuna popola komunumo.

Sed la disvolviĝo de Daĝaj ne estas glata. Sur la revolucia vojo ĝi spertis rigorajn provojn de la klasbatalo unu post alia.

En 1951, laŭ la socialisma direkto montrita de Prezidanto Maŭ, la partia filio kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj sin preparis por starigi agrikulturan kooperativon surbaze de la interhelpaj grupoj. Ĝuste en tiu tempo Liu Ŝaŭki, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, donis al ili nigran instrukcion, kalumniante, ke ilia plano pri starigo de kooperativo estas "utopia agrikultura socialismo", "erara" kaj "danĝera", kun la vana espero malhelpi Daĝaj-anojn plenumi sian planon. En 1952, pro la persista batalo de Daĝaj-anoj Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Ŝanhi fine aprobis nevolonte ke ili starigu malgrandan kooperativon el tridek familioj. La partia filio de Daĝaj opiniis tiun "decidon" konforma nek al la direkto montrita de Prezidanto Maŭ nek al la konscio kaj postulo de la vastaj amasoj pri starigo de kooperativo. Ĝi do mem fondis kooperativon el 49 familioj. Kaj nelonge post tio aliĝis al ĝi ĉiuj aliaj interhelpaj grupoj de la tuta vilaĝo.

En tiu periodo la renegato Liu Ŝaŭki plenenergie distrumpetis la t. n. "firmigon de la novdemokratia ordo", senbride kolportis reviziismajn nigrajn varojn kiaj "ekspluato havas meriton", "kvar liberoj", "multigo de kamparana familio kun tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro". Tiu nigra vento atakis ankaŭ Daĝaj. Profitante la okazon, kelkaj bienuloj kaj kulakoj en la vilaĝo disvastigis kapitalisman penson pri forlaso de agrikulturado por entrepreno de komerco, kun la vana espero konduki la

interhelpajn grupojn al erara vojo. Sub gvido de la partia filio la amasoj de Daĝaj repuŝis tiun inferan venton de detruo de kolektiva produktado kaj disvolvo de kulaka ekonomio. Ĉen Jongguj diris: "En la malnova socio mi estis jardungito de bienulo kaj havis nenion bezonatan. Tamen mi multe vidis ĉevalojn, plugilojn kaj ĉarojn de bienuloj. Pledi por 'tri ĉevaloj, unu plugilo kaj unu ĉaro' ja estas por nenio alia ol revivigi la ekonomion de bienuloj kaj kulakoj!"

En 1958, en respondo al la alvoko de Prezidanto Maŭ **"bona estas la popola komunumo"**, sub gvido de la partia filio de Daĝaj la vastaj amasoj de kooperativanoj fondis popolan komunumon. De tiam la altgrada kooperativo de Daĝaj transformiĝis en unu el la produktaj brigadoj de Daĝaj-komunumo.

Post la naskiĝo de la popola komunumo Daĝaj, neniam finiĝis la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Precipe en la daŭro de 2-3 jaroj post 1960, profitante la okazon ke nia lando suferis de naturaj katastrofoj en 3 sinsekvaj jaroj kaj la nacia ekonomio sin trovis en provizora malfacileco, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kun Liu Ŝaŭki kiel reprezentanto ekblovis inferan venton de "tri pliigoj kaj unu fikso", intencante subfosi la socialisman kolektivan ekonomion kaj restaŭri kapitalismon. Kaj la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de Hijang-gubernio persone iris al Daĝaj-komunumo por senkaŝe ruinigi la ruĝan flagon de Daĝaj persone starigitan de Prezidanto Maŭ. Tiam, sub la gvido de la partia filio de Daĝaj la vastaj amasoj de komunumanoj faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la klasaj malamikoj. La gvidaj membroj de la partia filio profunde kaj detale propagandis al la amasoj socialismon, kritikis kapitalismon kaj decideme gvidis ilin iri la socialisman vojon. Dank' al disvolvo de la spirito de penema lukto en malfaciloj dum multaj jaroj, la kolektiva ekonomio de la tuta brigado havis grandan disvolviĝon, eĉ en la periodo de la trijaraj naturaj katastrofoj ĝia progreso ne estis malrapidigita. Por subteni la socialisman konstruadon de la ŝtato, la kvanto de la greno liverita de la brigado al la ŝtato kreskis de pli ol 100,000 ĝinoj en 1959 ĝis 240,000 ĝinoj. La atingoj akiritaj de la partia filio de Daĝaj kune kun la amasoj en la klasbatalo kaj produkta batalo starigis brilan ekzemplon por disvolvi socialisman agrikulturon de Ĉinio multe, rapide, bone kaj ekonomie.

Klasaj malamikoj ne volontis akcepti sian malvenkon. En la vintro de 1964, profitante la okazon de la Movado de Kampara Socialisma Eduko de nia lando, ili sendis al Daĝaj laboran grupon el multaj homoj, ĉiamaniere provante nei la ruĝan flagon sur la agrikultura fronto. Alte tenante la grandan

*Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio de Daĝaj, parolas en kunveno de komunumanoj.*





*Kun solvendaj problemoj en klasbatalo kaj produkta batalo, la partia filio de Daĝaj studas kaj aplikas Maŭzedongpenson.*

ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la partia filio kaj komunumanoj de Daĝaj faris decideman batalon kontraŭ ili tiel, ke tute fiaskiĝis la intrigo de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

En tiu jaro la granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis la sekretarion de la partia filio de Daĝaj Ĉen Jongguj en Pekino kaj faris gravan instrukcion pri la laboro de Daĝaj. De tiam sub gvido de la partia filio de Daĝaj la komunumanoj senĉese kreis ankoraŭ pli grandajn atingojn.

## RIĈAJ RIKOLTOJ EN 9 SINSEKVAJ JAROJ

Daĝaj estis nefrekventata vilaĝo ĉe Tajhang-montaro en Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco. Antaŭ la Liberiĝo la tuta vilaĝo havis pli ol 4,700 apartigitajn malgrasajn parcelojn kun totala areo de nur 802 muoj. En jaro de la plej bona rikolto la pomua produktokvanto de greno atingis malpli ol 140 ĝinojn. Tiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj manĝis nur branon kaj manĝeblajn herbojn, kaj krome, mankis al ili vestoj. Pli ol duono de la vilaĝanoj devis labori kiel jardungitoj aŭ tagdungitoj de bienuloj.

Post la Liberiĝo, sub gvido de la partia filio de Daĝaj la vastaj amasoj de komunumanoj disvolvis spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj por reformi la naturon. Ili kulturis forstojn por konservi akvon kaj teron, fosis irigaciajn kanalojn por venki naturajn katastrofojn, reformis terkulturan sistemon kaj disvastigis sciencajn teknikojn. Disvolvante la kolektivan forton, ili per nur pli ol 100 laboruloj forportis pli ol cent mil kubmetrojn da ŝtonoj kaj konstruis 180 ŝtonajn digetojn kaj per tio formis altproduktajn kampojn unu post alia.

La pomua produktokvanto de greno en Daĝaj jam atingis pli ol 700 ĝinojn en 1962. La meznombra pomua produktokvanto de greno de la tuta brigado jam kreskis de 942 ĝinoj en 1969 ĝis pli ol 1,070 ĝinoj en 1970. Kaj en tiu jaro, ĝi vendis al la ŝtato pli ol 300,000 ĝinojn da superflua greno.


Sur kio sin apogis Daĝaj en akiro de la riĉrikoltoj? Ne sur helpo de la ŝtato, nek sur granda kvanto da kemia sterko liverita de la ŝtato, nek sur favoraj naturaj kondiĉoj. La riĉaj rikoltoj de Daĝaj en la 9 sinsekvaj jaroj plejparte estas akiritaj sub naturaj katastrofoj, inter kiuj tri estis tre gravaj. La unua grava katastrofo okazis en la unua tagdeko de aŭgusto de 1963. Pluvego en 7 sinsekvaj tagnoktoj estigis furiozajn monttorentojn, kiuj faligis en unu nokto la grandajn ŝtonajn digojn konstruitajn de

la komunumanoj en pli ol dek jaroj kaj detruis iujn el la kampoj kaj kavernodomoj. Tio estis eksterordinare granda diluvo nevidita en Daĝaj dum cent jaroj. La dua katastrofo estis sekego en aŭtuno de 1965, neniam vidita en la historio. Kaj la tria estis ruiniga hajlado en julio de 1968.

Kial Daĝaj-anoj povis akiri grandajn riĉrikoltojn de agrikulturo en la 9 sinsekvaj jaroj? La kialo kuŝas en tio, ke la partia filio kaj komunumanaj amasoj de Daĝaj iris larĝan socialisman vojon kaj vojon de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj.

La partia filio de Daĝaj firme sin apogis sur Maŭzedongpenso kaj firma kaj ĝusta politika direkto. En 1962, kiam la granda renegato Liu Ŝaŭki ekblovis nigran venton de "tri pliigoj kaj unu fikso", la partia filio de Daĝaj, anstataŭ lasi ĝin libere inundi, faris pint-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ ĝi, senŝanceliĝe gvidante la komunumanajn amasojn vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson. Rezulte de tio, en tiu jaro ilia pomua produktokvanto de greno kreskis de pli ol 500 ĝinoj ĝis 774 ĝinoj. En la tri grandaj revoluciaj movadoj, la partia filio kaj komunumanoj de Daĝaj-brigado lerte analizis la problemojn per materiisma dialektiko de Prezidanto Maŭ pri "**divido de unu en du**". Ekzemple, post analizo ili trovis, ke ofta sekeco estas la ĉefa kontraŭdiro en ilia batalo kontraŭ naturaj katastrofoj. Ili vidis ne nur, ke en ilia loko nur estas 500-600 milimetroj da pluvo po jaro, kiuj plejparte falis en julio kaj aŭgusto, tial ofte okazis sekeco; sed ili vidis ankaŭ, ke se oni bone konservas la 500-600 milimetrojn da pluvakvo en tero kaj ĝin plene uzas, ĝi sufiĉas tiam por kreskado de la plantoj. Tial antaŭ akvoutiliga konstruado ili faris laboron por konservo de akvo kaj humideco de grundo. Ĉiujare, per 50% de siaj laborfortoj ili ordigis la kampojn, turnis deklivajn kampojn en ebenajn ŝtuparajn kampojn, konstruis digetojn ĉe la kamprandoj, profunde plugis kaj sarkis kampojn k.a. Tiamaniere, plimulte da pluvakvo estis konservata en tero kaj per tio ili venkis ordinaran sekecon.

La partia filio de Daĝaj-brigado opiniis, ke antaŭ la eksterordinare granda natura katastrofo, se oni kuraĝas kaj lertas batali, oni povas akiri venkon, kaj povas vidi la duoblan naturon de la aferoj kaj konduki malbonajn aferojn al bona rezulto. En la plej malfacilaj kondiĉoj kiam okazis eksterordinare granda hajlo en 1968, la partia filio unue vidis, ke la homo estas la plej aktiva faktoro. Por homoj armitaj per Maŭzedongpenso ĉiaj malfaciloj povas esti venkitaj. Kaj ĝuste tiel iris la fakto. En tiu jaro la pomua produktokvanto de greno atingis 800 ĝinojn kaj superis tiun de 1967 je 30%. Krome, oni akiris senprecedence grandan riĉrikolton de legomoj. Ĉen Jongguj diris: "Granda katastrofo signifas grandan ŝanĝon." Tio ja estas vero. En tiu jaro Daĝaj ne nur akiris riĉrikolton, sed an-



kaŭ havigis al si novan eltrovon en la batalo kontraŭ hajlo. Ekde tiam ili turnis kampojn kun unu rikolto en unu jaro en kampojn kun du rikoltoj, kaj tiel kreis novan vojon por akiri ankoraŭ pli grandajn riĉrikoltojn.

La malriĉa Daĝaj antaŭ la Liberiĝo kun mizeraj homoj kaj malfekunda tero nun turniĝis en socialisman novan vilaĝon kun verdaj montoj, ebenaj kampoj, novaj domoj kaj gregoj da bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj.


### REVOLUCIECA GVIDA GRUPO

Sekretario de la partia filio Ĉen Jongguj ofte diris: "Por forĝi feron, oni mem devas esti fortika." Tio signifas, ke por efektivigi ideologian revoluciigon de la komunumanaj amasoj, antaŭ ĉio devas esti efektivigita ideologia revoluciigo de la kadroj de la partia filio kaj la partianoj. La sep komitatanoj kaj la membroj de la partia filio de Daĝaj ĉiuj indas la nomon de avangarda batalanto kaj kondukanto de la heroaj Daĝaj-anoj.


Antaŭ la Liberiĝo, Ĉen Jongguj laboris pli ol 20 jarojn kiel jardungito de bienuloj kaj spertis ĉiajn suferojn. En la pasintaj pli ol dek jaroj, post kiam li estis elektita kiel sekretario, li ĉiam iris antaŭ la amasoj en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. En 1969 li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en la Naŭa Kongreso de la Partio. Ŝanĝiĝis lia pozicio, sed ne ŝanĝiĝis lia naturo de laboranta popolano. Reveninte de Pekino post fermiĝo de la Naŭa Kongreso de la Partio, li tuj sin ĵetis en kolektivan laboron. Tiam la brigado ne asignis al li ian ajn laboron, li do elektis por si la plej pezan kaj plej malpuran laboron. Li diris: "Farante malpurajn kaj pezajn laborojn, oni povas preventi al si malpuriĝon de sia penso kaj disiĝon de la amasoj."

Gia Gincaj, la ekssekretario de la partia filio kaj nuna estro de la Ligo de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj de Daĝaj-brigado, estas maljunulo jam kun aĝo de pli ol 60 jaroj. En la naturreforma batalo li senlace plenumis la taskon haki ŝtonojn dum multaj jaroj. En la lastaj jaroj, kvankam li suferis de stomaka malsano, tamen li ĉiam persistis en laboro. Komunumanoj admonis lin dirante: "Maljuna Gia, vi faris grandan kontribuon por nia Daĝaj. Nun vi jam maljuniĝis kaj krome longe suferas de malsano, kiel vi povas labori same kiel junulo?" Sed maljuna Gia diris ridetante: "Mi revolucios dum mi vivos. Kompartiano faras revolucion ne por individua komforto, sed por feliĉa vivo de la tuta homaro."

La brigadestro kaj komitatano de la partia filio Gia Ĉengĵang laboris kiel dungito kaj karboministo antaŭ la Liberiĝo. Silentema kaj diligenta, li estas fidinda helpanto de la sekretario Ĉen Jongguj.



*La nova fizionomio de Daĝaj-vilaĝo*



*Denova riĉrikolto de grenoj kiel en lastaj sinsekvaj jaroj.*

Kvankam li estas tre okupata, tamen li neniam disiĝas de la kolektiva produkta laboro kaj ĉiujare li laboras pli ol 300 tagojn.

La partia filio tre atentis pri kulturado de daŭrigantoj de la proletara revolucia afero, rigardante tion kiel fundamentan laboron por garantii nian partion kaj ŝtaton neniam ŝanĝi sian koloron.

La nuna vicsekretario de la partia filio kaj sekretario de la filio de la Komunisma Junulara Ligo Guo Fenglian estas intelekta junulino reveninta en la kamparon post diplomiĝo en lernejo. Ŝi estas bona daŭriganto de la proletara revolucia afero. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "**ĉiuj revoluciuloj kaj ĉiuj revoluciaj junuloj devas iri en la mondon kaj sperti ventojn kaj pluvojn**", Ĉen Jongguj kaj la partia filio kuraĝigis ŝin hardi sin en la tri grandaj revoluciaj movadoj. En 1963, kiam Daĝaj suferis ruinigan diluvon, Fenglian kaj nombro da knabinoj konkure prenis sur sin pezajn laborojn, aktive savis havaĵojn de la kolektivo spite al vento kaj pluvo, vadante en kotoakvo. La komunumanoj laŭdis: "Ili estas kvazaŭ feraj homoj." De tiam Daĝaj-anoj nomis ilian grupon "taĉmento de feraj knabinoj". Poste, Fenglian laboris kiel la estro de la taĉmento kaj estis elektita kiel sekretario de la Komunisma Junulara Ligo. Nelonge post tio ŝi glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel vicsekretario de la partia filio. Dank' al hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio Fenglian fariĝis pli firma. Ŝi plurfoje estis akceptita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en Pekino. Antaŭ honoro ŝi tenas sin modesta kaj marŝas senĉese.

Post la batala bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio la ruĝa flago Daĝaj persone starigita de Prezidanto Maŭ brilas kun ankoraŭ pli freŝa koloro.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, Daĝaj-anoj faris grandajn kontribuojn. En la lastaj jaroj ili serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ "**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**", pliapaŝe altigis la konscion de daŭra revoluciado. Post tio la partia filio de Daĝaj sendis reprezentantojn de kadroj kaj komunumanoj por viziti al kaj lerni de avangardaj unuoj en lernado de Daĝaj en la propra provinco kaj aliaj lokoj, tio multe stimulis la kadrojn kaj komunumanojn de Daĝaj. Sekve ili elmetis por si la sloganon: "La tuta lando lernas de Daĝaj kaj Daĝaj lernas de la tuta lando." Ili brave marŝas sur la vojo de daŭra revolucio.

# Elstara Kompartiano Luo Majŝeng

EN la pasintaj 16 jaroj, Luo Majŝeng, laboristo kaj kompartiano de la porcelana fabriko Ruĝa Stelo de Gingdeĝen, Gianghi-provinco, diligente studis kaj aplikis la filozofian penson de Prezidanto Maŭ sur la fronto de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento, kaj bone ludis la avangardan rolon de proletara revolucia batalanto.

Lastatempe, la partia komitato de Gianghi-provinco honoris Luo Majŝeng per la titolo Elstara Kompartiano en Viva Studo kaj Viva Apliko de la Filozofia Penso de Prezidanto Maŭ.

## PERSISTA IRADO DE LA SOCIALISMA VOJO

Luo Majŝeng naskiĝis en familio de malriĉkamparano. Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, li decideme iris la socialisman vojon kaj en la jaro 1954, li aliĝis la unua al la Kvara Porcelana Kooperativo de Gingdeĝen, donante ekzemplon al aliaj. En la kooperativo, li laboris kun ankoraŭ pli granda entuziasmo kaj tutkore strebis al ĝia prosperado. Sed ne atendite, la kooperativo suferis malprofiton en la komenco. Ĝia kontisto ekgrumblis malkontente: "La kooperativo iras malbone pro la multeco de membroj kaj malsamaj opinioj, do preferinde estas malorganizi ĝin!" Luo Majŝeng trovis liajn vortojn malpravaj kaj diris decideme: "La kolektivigo estas brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ kaj ne devas esti forlasita!"


Ĝuste en tiu tempo, la supera instanco alsendis laboran grupon por helpi la kooperativon. Luo Majŝeng aktive prezentis al ĝi la situacion de la kooperativo. Iu kamarado de la labora grupo diris al li: "En la kooperativo estas multaj kontraŭdiroj, ekzemple timo pri malprofito, pledo por malorganizo kaj diversaj aliaj malbonintencaj agitadoj. El ĉiuj tiuj kontraŭdiroj oni devas kapti la ĉefan por solvi la problemojn."

Kio do finfine estas la ĉefa kontraŭdiro? Sub helpo de la labora grupo, Luo Majŝeng kaj kelkaj laboristoj kune serioze studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko*, *Pri Kontraŭdiro* kaj *Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio*, en ligo kun la aktualaj problemoj kaj faris analizon pri la kontraŭdiroj en la kooperativo.

Iuvespere, Luo Majŝeng revenis al sia hejmo kaj kiel kutime komencis serioze legi *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*. Li legis la vortojn "**Kiuj estas niaj malamikoj? Kiuj estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio.**" Subite klariĝis lia penso. Li tuj iris al kamaradoj de la labora grupo kaj diris: "La kontisto de la kooperativo ordinare agas kaŝeme kaj emas moki malice. Mi pensas, ke li certe kaŝas en si ion suspektindan." La kamaradoj de la labora grupo laŭdis lian revolucian spiriton de ligo de teorio kun praktiko kaj diris al li, ke li organizu enketan grupon por sondi la aferon.

Luo Majŝeng kaj la grupanoj faris profundan esploron kaj trovis, ke la kontisto ŝtelis porcelanaĵojn en profunda nokto kaj dissemis ĉie kalumniojn kontraŭ la kooperativo. Krome, ili malkovris ankaŭ liajn kontraŭrevoluciajn krimojn antaŭ la Liberiĝo kaj ke li estas kontraŭrevoluciulo ŝteliĝinta en la kooperativon. Ili do movis la amasojn batali kontraŭ li kaj tiel firmigis la kooperativon.

En la batalo, la laboristoj levis sian klasan konscion. En novembro de 1954, Luo Majŝeng glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.



*Kamarado Luo Majŝeng*

En printempo de 1955, Luo Majŝeng iniciatis organizon de laborista filozofia studrondo, la unua en Gingdeĝen. Poste, kiam la Kvara Porcelana Kooperativo transformiĝis en lokan ŝtatan porcelanan fabrikon Ruĝa Stelo, li starigis en la fabriko filozofian studrondon el pli ol 120 laboristoj.

## FILOZOFIO KIEL BATALILO

En 1961, kiam nia nacia ekonomio renkontis provizoran malfacilon kaŭzitan de naturaj katastrofoj, la dekstraj oportunistoj atakis la ĝeneralan linion de socialisma konstruado de la Partio, la grandan antaŭensaltegon kaj popolan komunumon, kaj troviĝis ankaŭ iuj kiuj ne povis ĝuste rilati al la provizoraj malfaciloj. Luo Majŝeng elpaŝis la unua el la amasoj por akcepti la defion. Li studis foje kaj refoje la instruon de Prezidanto Maŭ kune kun ili: "**Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas ekzameni ĝian esencon kaj trakti ĝian aspekton nur kiel enkondukanton ĉe la sojlo, kaj transpaŝinte la sojlon ni devas tuj ekpreni ĝian esencon; nur tio estas fidinda kaj scienca metodo de analizo.**" Li pensis, ke la ekzistantaj malfaciloj estas nur provizoraj fenomenoj en antaŭenmarŝo kaj estas tute venkeblaj. La absurdajn sensencaĵojn dissemitajn de la dekstraj oportunistoj oni nepre devas kritiki firme.

Luo Majŝeng do verkis dazibaŭon, en kiu li forte kritikis la dekstrajn oportunistojn refutante iliajn absurdajn argumentojn per cito de multaj faktoj kiel atestoj. Sub lia ekzemplodono, tuj leviĝis amasa revolucia kritiko en la fabriko.

Foje, lige kun la realo de la fabriko, li propagandis la veron inter la laboristoj, ke certe venkos socialismo, kaj esprimis sian decidemon venki la provizorajn malfacilojn. Tio multe kuraĝigis la laboristojn. Iuj laboristoj diris tenante lian manon: "Vi eldiris nian koran senton. La nunaj malfaciloj ja signifas nenion. Ni nepre klopodos pliprodukti kaj frakasi la kalumniojn de la dekstraj oportunistoj kontraŭ la socialisma afero per praktikaj agadoj." En tiu jaro, la fabriko plenumis la ŝtatan produk-

tan planon je 92 tagoj pli frue.

Dum tiu periodo, Luo Majŝeng skribis pli ol dek artikolojn, inkluzive de *Pri la Malfaciloj* kaj *Vidi la Esencon tra la Fenomenoj.*

## SUR LA PLEJFRONTO DE LA BATALO

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, Luo Majŝeng ĉiam persistis en "**tenado de la revolucio, stimulado de la produkto**" sur la plejfronto. Tuj je la komenco de la movado, Luo Majŝeng kun senlima fideleco al Prezidanto Maŭ, la unua faris fortan kritikon kontraŭ la reakcia reviziismo sur la urba podio de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por fari amasan revolucian kritikon. Kiam la Ruĝa Gvardio leviĝis por frakasi la malnovajn ideologion, kulturon, morojn kaj kutimojn de la ekspluataj klasoj kaj starigi novajn ideologion, kulturon, morojn kaj kutimojn de la proletaro, li foje kaj refoje iris en lernejojn por entuziasme subteni la revoluciajn agojn de la ruĝaj gvardianoj, kaj li ofte iris inter laboristojn, lernantojn kaj loĝantojn por propagandi la filozofian penson de Prezidanto Maŭ.

En la fabriko, kune kun la vastaj amasoj de proletaraj revoluciuloj, li ripetade studis la *Decidon de la Centra Komitato de Komunista Partio de Ĉinio Koncerne al la Granda Proletara Kultura Revolucio* ellaboritan sub la persona prezido de Prezidanto Maŭ, malkaŝis kaj kritikis la krimojn de la enpartiaj potencenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Kiam la lastaj provis korodi la laboristojn per la kontraŭrevolucia ekonomiismo kaj subfosi la "**tenadon de la revolucio, stimulon de la produkto**", li ĝustatempe malkaŝis tiun intrigon kaj persiste laboris sur sia produkta posteno, donante ekzemplon al la laboristoj.

En la lastaj jaroj, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ en *Pri Praktiko*, li sukcesis elfari aŭtomaton por muldado de porcelanaĵoj kaj tute aŭtomatigis la duonaŭtomatan glazuradon, dank' al kuna penado kun laboristoj.

*Luo Majŝeng (la dua de dekstre) sukcesis fari aŭtomatan muldilon kune kun laboristoj.*





*Luo Majŝeng parolas pri sia komprenaĵo en studo kaj apliko de la verko de Prezidanto Maŭ* Pri la Praktiko.

En somero de 1966, Luo Majŝeng kaj la 11 laboristoj de la eksperimenta grupo komencis provadon de faro de aŭtomato por muldado de porcelanaĵoj. Ili ofte laboris ĝis profunda nokto, interkonsiliĝante, desegnante kaj provante.

Sed la enpartiaj potenctenantoj tute ne atentis la provadon de teknika renovigo de la laboristoj, kaj ili kolektis alian grupon da homoj por fari ankaŭ muldadan aŭtomaton. Kiam ili ankoraŭ sin okupis pri serĉado de donitaĵoj en kabineto, Luo Majŝeng kaj la laboristoj de la eksperimenta grupo jam komencis provi la funkciadon de sia prove elfarita aŭtomato por muldado. La unua prova funkciigo malsukcesis, sed Luo Majŝeng kaj liaj kamaradoj ne deprimiĝis. Ili tiris lecionon el tiu malsukceso kaj komencis eksperimenti denove.

Tiutempe, la veteranaj laboristoj kaj revoluciaj kadroj en la fabriko konkure ilin helpis per proponoj kaj konsiloj. Kun komunisma spirito de interhelpo, la laboristoj de la metaltranĉa laborejo meminiciate prilaboris por ili partojn de la mulda aŭtomato; kaj laboristoj de la laborejo por muldado liveris al la eksperimenta grupo premitan sekan primaran muldaĵon por fari eksperimenton.

Post sia fondiĝo, la nova revolucia komitato forte subtenis la teknikan renovigon de Luo Majŝeng kaj liaj kamaradoj kaj rapide naskiĝis la aŭtomato por muldado de porcelanaĵoj. Ĝia laborefiko estas 6-oble pli alta ol tiu de duonaŭtomata muldmaŝino, kaj dank' al apliko de la nova maŝino granda kvanto da laborforto estas ŝparita kaj same ankaŭ pri la plankareo de la laborejo. Sed la t. n. aŭtomata muld-maŝino, farita de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, laŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, kiu pruviĝis neuzebla en produkto, kvankam por ĝi oni elspezis multe da mono.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, Luo Majŝeng kreis kune kun aliaj laboristoj 5 specojn de maŝino por glazurado kaj multe kontribuis en plibonigo de la produkta fizionomio de porcelanaĵoj.

AN VEN:

# Senvelka Revolucia Spirito

## —Pri kompartianino Dong Cajbaŭ

EN la socialisma Ĉinio miloj kaj dekmiloj da virinoj okupiĝas pri gvidaj laboroj de diversaj niveloj. Tiuj eminentaj kadrinoj ĉiam staras sur la plejfronto de la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Ĉi sube ni rakontu al vi pri kamaradino Dong Cajbaŭ, landa popola reprezentanto kaj vicestro de la revolucia komitato de Angi-gubernio.

Dong Cajbaŭ jam estas 73-jara. En la malluma malnova socio ŝi laboris kiel bruto ĉe bienulo kaj pasigis longajn suferoplenajn jarojn. En 1949, la popola armeo sub la komando de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ liberigis ŝian hejmlokon kaj ŝi akiris novan vivon.


En printempo de 1954, varme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **"organiziĝu"**, Dong Cajbaŭ kaj la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de ŝia hejmvilaĝo Bajsi fondis agrikulturan kooperativon kaj ŝi estis elektita kiel ĝia vicestro. Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la agrikultura kooperiga movado en Bajsi vigle disvolviĝis same kiel en aliaj lokoj de la lando. Sed por restaŭri kapitalismon, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ekblovis nigran venton dehaki kooperativojn. Dong Cajbaŭ kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme staris kontraŭ ĝi. Ŝi kaj estro de la kooperativo Kiu Songking firme unuiĝis kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kune kun ili mem preparis monon por aĉeti bovojn kaj agrikulturilojn, tiel ke prosperiĝis la kolektiva produktado. En tiu jaro, la kooperativo renkontis grandan sekecon maloftan en la historio. Kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta kooperativo Dong Cajbaŭ hakis montojn por alkonduki akvon kaj tiel venkis sekecon kaj akiris grandan riĉrikolton. La pomua produktokvanto de greno kreskis je pli ol 200 ĝinoj kompare kun tiu de bonhavaj kamparanoj en individua mastrumado. Tio plene manifestis la senkomparan superecon de la kolektiva ekonomio.


Dong Cajbaŭ senŝanceliĝe iris sur la socialisma vojo kaj senĉese altiĝis ŝia konscio pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo. En 1966, la fajro de la Granda Proletara Kultura Revolucio brulis tra la tuta gubernio Angi. Serioze studante la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj alte tenante la revolucian standardon **"bravas ribelo kontraŭ la reakciuloj"**, Dong Cajbaŭ batalis kune kun la komunumanoj kontraŭ la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj plenmano da lokaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. En marto de 1968, kiam stariĝis la revolucia komitato de Angi-gubernio, ŝi estis elektita kiel ĝia vicestro. De tiam ŝi ankoraŭ pli diligente vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, kaj ĉiam pli altiĝas ŝia revolucia spirito tutkore servi por la revolucio kaj popolo.

Post la Novjara Tago de 1970, kiam la gubernia revolucia komitato diskutis pri efektivigo de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ fini la staton transporti karbon de nordo al sudo, ŝi tuj rapidis al la komunumo kaj kune kun ĝiaj komitatanoj serioze diskutis pri tiu problemo. Sub la gvido de ŝi kaj komunumaj kadroj, komunumanoj iris sur montojn por serĉi karbon kaj fine trovis ĝin en iu malgranda rivervalo de Huanglingvu. Por pli frue elfosi karbon kaj glorigi la grandan socialisman patrolandon, ŝi la unua iris en la rivereton por dreni akvon kaj fosi karbon. Tramalsekiĝis ŝia vesto, sed ŝi persistis en laboro kaj fine elfosis "nigran oron" kune kun la aliaj. Ili per fakto refutis la absurdan aserton de Liu Ŝaŭki ke "en Ĝegiang ne estas karbo", kaj forte akcelis la karboekspluatan kampanjon de la tuta gubernio.

En la amasa movado de lerno de Daĝaj, ŝi ĉiam iris fronte donante bonan ekzemplon por aliaj. Sub ŝia gvido, la komunumanoj de Bajsi peneme konstruis 10 muojn da ŝtuparaj kampoj ĉe la piedo de Panlong-monto dum unu vintro kaj unu printempo kaj rikoltis pli ol 8,000 ĝinojn da rizo en 1970. Zorgante ŝian sanon, la komunumanoj kore admonis

*La kompartiano Dong Cajbaŭ inter infanoj*






*Dong Cajbaŭ (dekstre) studas verkon de Prezidanto Maŭ.*

ŝin: "Onklino Dong, la sano estas kapitalo de revolucio, bone ĝin zorgu do!" Ridetante ŝi diris: "Por kio oni uzu la kapitalon de revolucio, se ne por revolucio?"

Sur la vojo de daŭra revolucio, kamaradino Dong Cajbaŭ soife vive studas kaj vive aplikas la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj ĉiam agas laŭ alta normo de "**ekskluziva**" kaj "**senrezerva**" servo al la popolo kaj "**kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**". Foje, ŝi iris al la trupo por vidi sian filon. Tiun tagon subite falis neĝflokoj, vespere ekblovis ventego. Tiam Dong Cajbaŭ tuj ekpensis: Ĉu la personoj de "kvin protektoj" de la brigado ne renkontas malfacilojn en tia granda neĝvento? Ĉu la drena kanaleto estas ŝtopita? Ĉu la prove kulturataj bambuoj estas difektitaj pro neĝa premo? Tion pensante, ŝi tre maltrankviliĝis kaj volis tuj rapidi al la brigado. Travidinte ŝian penson, ŝia filo ŝin admonis: "Panjo, hodiaŭ neĝegas kaj aŭto ne povas veturi. Restu ĉi tie trankvile kelkajn tagojn kaj mi akompanos vin hejmen, kiam aŭto povos veturi." Nokte ŝi dormis malbone kaj turniĝadis en la lito. Ŝi pensis, ke en malfacila tempo komunistano devas teni en sia koro la amasojn. Ŝi do forlasis la trupon en la sekvinta tago, dankeme ri-



*Dong Cajbaŭ ĉiam vivas kaj laboras inter komunumanoj.*

fuzinte la admonon de sia filo kaj kamaradoj kaj revenis al la brigado spite al frosta norda vento. Anstataŭ eniri sian domon, ŝi unue vizitis la personojn de "kvin protektoj" kaj poste rigardis la bambuojn. Ŝi trankviliĝis, nur kiam ŝi vidis, ke ĉio estas bone aranĝita de kadroj kaj komunumanoj de la brigado.

Por propagandi Maŭzedongpenson diversloke, Dong Cajbaŭ ofte faris piediradon spite al varmega suno, neĝvento kaj laciĝo. Foje, milicanoj sur la akvokonservejo de Pancun de Ŝanhe-komunumo petis ŝin paroli pri sia komprenaĵo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Tiam respondecaj kamaradoj de la komunumo sciis, ke ŝi ne estas tiel sana kaj admonis ŝin ne iri tien. Sed ŝi pensis: "Por protekti la posedaĵojn kaj vivon de la popolo, la milicanoj tagnokte laboras sur la akvokonservejo. Mi estas kompartianino, propagandi Maŭzedongpenson estas mia sankta devo." Tion pensante, ŝi venis al la konstruejo piedirinte 15 liojn da montvojeto malgraŭ sia malforta sano.

Neniam velkos la revolucia spirito de Dong Cajbaŭ. Ŝi aktive gvidas la revoluciajn amasojn por senĉese akiri novajn venkojn.

# Vicprofesoro Ĝang Ŝimej en la Kamparo

ĜANG Ŝimej estas vicprofesoro en la Gianghi-a Agronomia Universitato. Li studis entomologion preskaŭ 30 jarojn. En oktobro 1968, sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**sendi la vastajn amasojn de kadroj al fizika laboro estas tre bona ŝanco de denova lernado por la kadroj**", li venis al Lantian-brigado de Fenghin-gubernio, Gianghi-provinco, por ricevi reedukon de kaj aktive servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj trovis ilian varman akcepton kaj laŭdon. En decembro de la lasta jaro, li estis elektita kiel alterna membro de la tria Gianghi-a provinca komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

Ĝang Ŝimej vivis pli ol 20 jarojn en la malnova socio kaj ricevis la burĝaran edukadon. Post la Liberiĝo, venenita de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki, dum longa tempo li loĝis profunde en granda domo, fosis en la literaturo, skribis disertaciojn kaj strebis al persona famiĝo, serioze apartiĝante de la proletara politiko, la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj produkta praktiko. La amasa kritiko al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki en la Granda Proletara Kultura Revolucio donis al li profundan edukon, tiel ke li ekhavis ekstreman malamon kontraŭ ĝi. Post tio li firme decidis komplete remuldi sin sur la plej antaŭa fronto de la tri grandaj revolucioj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj iri la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj.

Kiam li ĵus venis al la kamparo, kvankam li subjektive volis fandiĝi en la amasojn, tamen li ne povis trovi la komunan lingvon kun ili en la penso. En paroloj kaj laboroj li ofte estis singardema kaj timis fari eraron. Nelonge post lia veno al la vilaĝo, la brigado portis nombron da arbidoj de oranĝo por provi planti ilin sur montoj. Rimarkante la neĝtavolon je futo dikan kovrantan la teron, li volis admoni al ili ke oni unue ĵosu la arbidojn en ĝardeno kaj poste, kiam varmiĝis la vetero, ilin plantu sur la montoj por certigi la vivadon post transplantado. Tamen, pensante ke li venas por ricevi reedukon, li ekhezitis, ĉu decas al li laŭvole admoni jen en tio jen en alio. Do la vortoj estis englutitaj antaŭ ol veni al la lango. Pro tio multaj arbidoj pene plantitaj sur la montoj ne povis viviĝi. Tiu fuŝaĵo tre maltrankviligis la kadrojn kaj la komunumanojn kaj ili faris ĉion por protekti la restantajn arbidojn. Komparante ilian varman amon al kolektiva havaĵo kun sia individuisma konsidero, Ĝang Ŝimej kun bedaŭro demandis al si: "Kial mi havas tian malsaman penson kaj senton ol la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj?" Vespere li studis la instruon de Prezidanto Maŭ: "**Antaŭ ol sin ĵeti plene en la revoluciajn luktojn de la popolamasoj aŭ decidi definitive servi la interesojn de la popolamasoj kaj kombiniĝi kun ili, la intelektuloj ofte havas subjektivismajn kaj individuismajn tendencojn kaj malplena estas ilia pensado kaj ŝanceliĝema estas ilia agado.**" Kaj li trovis la kaŭzon en sia mondkoncepto.

De tiam, li ĉiam prenis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel sian modelon, klopodis reformi sian burĝan mondkoncepton en la tri grandaj revoluciaj bataloj kaj hardadis sian revolucian volon. En vintro de tiu jaro li meminiciate petis partopreni iun konstruan laboron por sin hardi. La unuan fojon Ĝang Ŝimej iris pli ol 20-lian montvojon mem vektoportante sian pakaĵon. En la konstruejo, li konkure prenis sur sin la penigajn laborojn. Bruniĝis lia vizaĝo, kaliĝis liaj manoj, kaj pli kaj pli saniĝis ankaŭ lia ideologio.

Antaŭe, liaj sciencesploraj temoj tute apartaj de la praktiko ne trovis aprobon ĉe la amasoj. Pri tio, anstataŭ modeste aŭskulti iliajn opiniojn por plibonigi sian laboron, li fidis nur sin mem. Post

*Ĝang Ŝimej (dekstre) kaj komunumano surmonte kolektas fiinsekto-mortigajn vegetaĵojn.*



sia veno al Lantian-brigado, li ricevis lecionon de viva fakto. Iutage li ŝprucigis insekticidon sur kampoj kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li proponis ke oni tion faru kolono post kolono laŭvice por ne preterlasi ion. Sed, la aliaj diris al li, ke laŭ lia maniero la insektoj estos pelataj al apudaj kampoj. Oni ŝprucigis la insekticidon de ĉirkaŭo al la centro kaj multe altigis la efikon. En alia fojo, kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj li aspergis insekticidon sur granda areo por preventi malutilon de fiinsektoj. Sed ne sufiĉis la aspergiloj. Kion fari? Li ne povis trovi rimedon en libroj. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj interkonsiliĝis en kamporando kaj tuj decidis duobligi la pocentojn de la enteno de la medikamento, tiel ke altiĝis la efiko de aspergiloj.


Konscience akceptante la reedukon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Ĝang Ŝimej multe ŝanĝiĝis en sia spirita fizionomio. Li diris: "Miajn sciojn donis al mi la laboranta popolo; mi nepre dediĉos ĉiujn miajn sciojn en servo al ili, al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado."

Lantian-brigado situas en montregiono, kie oni antaŭe neniam kulturis rizon dufoje en unu jaro. En 1969 la brigado decidis tion provi por rikolti pli da rizo por la ŝtato. Sed oni ne trovis bonan metodon por akceli la rapidan burĝonadon de la frua rizo. Ĝang Ŝimej meminiciate prenis sur sin la taskon. Li proponis organizi specialajn grupojn en la kvar produktaj grupoj kaj rapidigi la burĝonadon per varmeta akvo. Ĉiutage li piediris dekojn da lioj por laŭvice viziti la kvar grupojn kaj prizorgi la kreskadon de la plantidoj. Dank' al lia klopodo, la brigado ŝparis 5-7 tagojn en kreskigo de plantidoj kaj tiel kreiĝis kondiĉo por du rikoltoj de rizo en unu jaro.

En printempo de la antaŭlasta jaro, Ĝang Ŝimej trovis ke la kampoj de fruaj rizplantoj estas atakataj de fiinsektoj. Li tuj raportis la aferon al la produkta grupo, la brigado, la komunumo kaj la gubernia revolucia komitato kaj proponis kontraŭrimedon. Por ke la amasoj konu la vivkutimon de la fiinsektoj kaj pli efike ilin ekstermu je konvena tempo, li montris specimenojn de la fiinsektoj kaj pacience rakontis al ili ilian vivadon. Krome, li kulturis por ĉiu produkta grupo de la komunumo unu aŭ du personojn pri preventado kaj forigo de malutiloj de fiinsektoj kaj plantmalsanoj.

Poste, la revolucia komitato de la komunumo taskis al li la laboron de prevento kaj forigo de malutiloj de fiinsektoj kaj plantmalsanoj. Li agrable akceptis la taskon. Ĉiutage li ellitiĝis frue kaj enlitiĝis malfrue por fari enketon kaj esploron, kaj kune kun amasoj analizi la konstatitan staton de fiinsektoj kaj plantmalsanoj kaj ellabori kontraŭrimedojn. En pli ol du monatoj li preskaŭ vizitis ĉiujn produktajn grupojn de la komunumo kaj iafoje li marŝis en unu tago kelkdek liojn trans montoj kaj akvoj, sen plendo pri laciĝo. Iun tagon li revenis post observado de la kampoj de iu brigado. Sur la vojo li trovis ke en pli ol dek muoj da rizkampo en iu fora montvalo aperis fiinsektoj. Tiam preskaŭ noktiĝis kaj la komunumanoj jam finis sian taglaboron kaj revenis hejmen, ke li ne povis trovi iun por informi la aferon. Pensante ke atendi ĝis la venonta tago pliigos la damaĝon al la rizplantoj, li tuj retroiris kelkajn liojn kaj akompanis la koncernan respondeculon al la kampo. Kaj li revenis hejmen nur post interkonsiliĝo pri rimedo aplikota por ekstermi la fiinsektojn. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al li: "Jen ni kamparanoj bezonas ĝuste tian intelektulon, kia vi!"

*Ĝang Ŝimej (maldekstre) laboras kune kun komunumanoj.*





*Ĝang Ŝimej (la dua de maldekstre) kaj komunumanoj observas fiinsektojn surkampe.*

Ĉe aŭdo de la laŭdo, multaj memoroj venis al la kapo de Ĝang Ŝimej. Antaŭ la granda kultura revolucio, apartiĝinte de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj de produkta praktiko, li foruzis dek kelkajn jarojn por fari studojn sen signifaj rezultoj pri temoj kiel "la rezistforto de insektoj kontraŭ malsato" kaj "vertikala distribuo de insektoj". Foje kiam li pasis preter rizkampoj damaĝataj de fiinsektoj, li eĉ rifuzis doni helpojn petitajn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per preteksto de manko de tempo, por rezervi ĝin plene al skribado de disertaĵo. Nun, li profunde sentis, ke estas granda vero la instruo de Prezidanto Maŭ: "**. . .se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio.**"

En du jaroj, Ĝang Ŝimej vivis kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, serioze observis kun ili la vivon de diversaj fiinsektoj kaj iliajn malutilojn kaj elmetis serion da praktike aplikeblaj proponoj por ekstermi fiinsektojn, kiuj malutilas en la montregiono al la rizplanto, maizo, sorgo, olea kamelio, kaŝtanarbo, helianto k.a. grenoj kaj ekonomiaj plantoj.

En marto 1970, li estis transpostenigita al la gubernia fabriko de agrikulturaj medikamentoj por provfabriki novajn agrikulturajn medikamentojn. Kvankam tiu laboro estis tute fremda por li, tamen li diris: "Kio estas necesa por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, estas la plej bona sciencesplora tasko por mi." Tuŝite de lia sincera sinteno, la maljuna kuracherba kulturisto Ĝong Ĵongkang kondukis lin sur montojn kaj ili kolektis tie dum tri tagoj pli ol 60 diversajn sovaĝajn kreskaĵojn, kiuj utilas al liaj laboroj. Kaj poste la maljunulo serioze instruis al li karakterojn de tiuj kreskaĵoj por fari distingon. El tio Ĝang Ŝimej akiris multajn sciojn, kiujn li ne povas trovi en sia laboratorio. Tio estis alia akiraĵo ricevita en lerno de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Li krome vizitis dekojn da malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj kolektis sume pli ol 150 specojn de sovaĝaj medicinaj vegetaĵoj. Post provado li sukcesis fabriki kelkajn insekticidojn, kies krudmaterialoj estas abunde akireblaj kaj kies produktaj procedoj sufiĉe simplaj. Dank' al disvastigo de tiuj produktaĵoj en la tuta gubernio, estis efike eliminitaj fiinsektaj malutiloj kaj ŝparita por la kolektivo granda sumo da monrimedoj. Lastatempe, sub la helpo de la amasoj li elfaris kelkajn novajn insekticidojn kun alta efikeco kaj malalta produkto-kosto, utiligante la tabakon, kerosenon, senutilajn akvojn de paperfarejo kaj rekrementon de premita olea kamelio kun mikso de iom da kemia insekticido. Per tio li faris novan paŝon sur la vojo de kombiniĝo kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj.

ĜENG VEN:

# Vizito al la Familio de Tibeta Laboristo



*Avangduogi (maldekstre) kaj lia frato Pingcuo riparas maŝinon en la fabriko.*

EN iu tradicia festotago de tibetanoj mi vizitis la familion de Avangduogi, tibeta laboristo de la Dongfeng-a Ŝua kaj Ĉapela Fabriko en Lhasa. Same kiel la aliaj servutuloj, lia familio nun fariĝis mastro de la nova socio, kaj la vivo ĉiam pli boniĝas depost la Liberiĝo.

Kiam mi venis al lia familio, Avangduogi kaj lia patrino Ciĵenlaĝen vestis sin per festaj kostumoj kaj la maljunulino okupis sin pri preparo de butera teo por regali gastojn. La familio konsistas el ok membroj kaj loĝas en tri vastaj ĉambroj ricevitaj post la Liberiĝo. Sur la nove kalkita muro de la meza ĉambro estas portreto de Prezidanto Maŭ. Krome, pendas ankaŭ la honoratestiloj, kiujn li kaj liaj junaj gefratoj ricevis respektive de siaj fabrikoj. La tri ĉambroj estas nete kaj pure ordigitaj. Sur la sep litoj troviĝas dikaj tibetaj tapiŝoj kaj vatitaj litkovriloj bone falditaj. En la orienta ĉambro estas kvar grandaj kestoj por teni vestaĵojn; en la okcidenta pendas multe da bova kaj ŝafa viando, kaj en ŝranko abundas butero kaj kukoj.

Prenante mian manon, la patrino diris kun ekscitiĝo: "Kiel ni povus havi tiajn tagojn kiel la nunajn, sen Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio! En la malnova socio nia familio migris ĉie, ne povante trovi vivcertecon!. . ." Ekbrilis larmoj en ŝiaj okuloj, kaj Avangduogi daŭrigis anstataŭ ŝi la rakonton pri suferitaj mizeroj en la malnova socio.

Antaŭ la Liberiĝo, ni loĝis en la gubernio Nanmulin, Ŝkaze, kaj de generacioj niaj prapatroj plenumis forĝistan metion kiel servutuloj de la servuta mastro, vivante malpli bonan vivon ol tiun de brutoj. Tiam ni estis rigardataj de la mastro kiel "la plej malsuperaj homoj". Ne povante elteni la kruelan ekspluaton kaj subpremon, mia patro decidis fuĝi kun la tuta familio al Lhasa por trovi pli tolereblan vivon en la loko, kie loĝas la "budho". Sed en Tibeto regata de la servuta sistemo ĉie estis inferoj por ni, tion ni baldaŭ konkludis, kiam ni venis al Lhasa almozpetante. Antaŭ ol pasis unu monato, miaj geavoj kaj geonkloj mortis unu post alia pro malsato kaj frosto. Kvankam mia patro laboris kiel forĝisto, tamen sub la peza senpaga laboro deviga laŭ hulak-servsistemo li ne povis vivteni la familion kaj devis ĝin reporti al Nanmulin, kiam mi estis 12-jara. Tie ni havis nek teron nek domon. La tuta familio sin premis en difektita tendo, kiu povis rezisti nek kontraŭ pluvoj en somero nek kontraŭ frosto en vintro. Tamen ni devis pagi imposton de 2.5 juanoj ĉiumonate al la mastro-sinjoro por ne esti forpelitaj. Krome, la gepatroj devis fari senpagan laboron por la mastro-sinjoroj. Ili apartenis respektive al malsamaj mastro-sinjoroj kaj estis senigitaj je ĉiuj liberecoj. Por rezisti kontraŭ la subpremo de la mastro-sinjoro, la patro forkuris kun la familio al Nagĉu, sed malfeliĉe estis

kaptita de la mastro-sinjoro, kiu pune skurĝis la patron. Kunpremante la pugnojn, Avangduogi daŭrigis: "Panjo tiam pretis per sia vivo venĝi al la mastro-sinjoro pro la tutkorpa vundo de la patro. Tio ne okazis nur pro la konsidero, ke oni ne oferu la vivon vane, sed nepre vivu ĝis la tago de liberiĝo."

Tiutempe jam revenis la kvin gefratoj de Avangduogi. Aŭdinte de la plej aĝa frato la rakontadon pri la pasintaj suferoj, ĉiuj indigne kaj senkompare malamis la kriman malnovan socion.

"Kiel ajn altaj estas la Himalajoj, ili ja havas pintojn; kiel ajn longa estas la rivero Jalucangpo, ĝi ja havas fonton; kaj kiel ajn granda estas la mizero de la tibeta popolo, ĝi ja havas finon. Fine ekskuis la ĉielon printempa tondro en Tibeto kaj leviĝis tie la ruĝa suno," kun ekscitiĝo diris Avangduogi. "En 1951, Prezidanto Maŭ sendis al Tibeto la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon. Kun ĝia helpo, ni faligis la kriman feŭdan sistemon servutan. En la 20 jaroj post la Liberiĝo mondrenversa ŝanĝo okazis en Tibeto. La miliona servutularo emanci-piĝis kaj vivas feliĉe." Tiam la patrino montris al mi la kvar filojn kaj du filinojn, dirante: "En la malluma malnova socio, mi naskis naŭ infanojn, el kiuj tri mortis pro malsato kaj frosto. Nun dank' al Prezidanto Maŭ ni vivas tre feliĉe. Miaj plej aĝa kaj tria filoj, du filinoj kaj la unua bofilino estas nun laboristoj. Ili diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ kaj aktive plenumas siajn laborojn. Du el ili glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj unu estas membro de la Komunista Junulara Ligo. Mia dua filo aniĝis al ĈPLA kaj estis elektita lastajare kiel aktivulo de lerno de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj batalanto kun kvin bonoj. Mi nun estas 53-jara kaj ne sentas min maljuna, vidante ke la infanoj ĉiuj aktive laboras por socialisma konstruado. Mi estis elektita kiel komitatano de la kvartala loĝantaro kaj ne ŝparos mian energion por bone plenumi mian taskon."

Tiam la pliaĝa filino, kiu laboras en la Lhasa-a Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj, ekparolis. "Antaŭe ni ne povis kvietigi nian malsaton eĉ per akvo kaj *canba-o* (plej ordinara manĝaĵo en Tibeto farita el faruno de nuda hordeo), nun ni havas kiel manĝaĵon ne nur *canba*-on sed ankaŭ rizon, tritikon, buteron, bovan kaj ŝafan viandon. Antaŭe niaj vestoj estis ĉifonaj kaj ni pasigis malvarman vintron eĉ nudpiede; nun ni portas vestojn el fortika teksaĵo kaj botojn. Antaŭ la Liberiĝo ni estis pelataj de la mastro-sinjoro kiel brutoj por plenumi hulakservon, kaj nun ni estas mastroj de la lando laborantaj por konstrui socialismon. El niaj salajroj ni ĉiumonate havas superfluon post kovro de la elspezoj de nia familio, tiel ke ni aĉetis brakhorloĝojn kaj biciklojn."

Avangduogi diris signifoplene: "Kiu iris en malluma nokto, plej bone konas la valoron de lumo, kaj kiu multe suferis de malsato kaj frosto, plej bone scias ŝati la varmon de la suno."

Same kiel la familio de Avangduogi, la miliona servutularo de Tibeto nun havas feliĉajn tagojn kaj jam suriris la luman vojon de socialismo, kiu certigas al ili ĉiam pli bonan vivon.




*Avangduogi kaj liaj familianoj interparolas pri sia komprenaĵo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.*

# Laŭdindaj Avangardaj Batalantoj

Vang Ŝuĝen, laboristino de la Tiangin-a Kvara Kotona Ŝpinejo rakontas sian komprenaĵon akiritan en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.






Ven Ŝuĝen (la dua de maldekstre), kiu la unua estris la virinan fiŝboaton "8 Marto" de Ĝangzi-komunumo de Ĉanghaj-gubernio, Liaŭning-provinco, nun estas vicestrino de la Ljuda-a Revolucia Komitato.

Ciĵeniamu (maldekstre), vicestrino de la revolucia komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj estrino de la revolucia komitato de Gieba-komunumo de Najdong-gubernio, estas en laborpaŭzo.

La armea reprezentanto Hing Hili konstante partoprenas produktan laboron por lerni de laboristoj kaj kunfandiĝi kun ili.







Vu Genliu (maldekstre), laboristo de la oleputo n-ro 19
olekampo serioze kontrolas la staton de subtera ole

Peng Guanŝu (dekstre), sekretario de la partia komitato de Luota-komunumo, Hunan, mobilizas la amasojn al suriro de la vojo de Daĝaj kaj estas bona gvidanto, kiu interkonsiliĝas kun la amasoj en siaj laboroj.

Song Lijing, komitatano de la partia filio de Daĝaj-bri
Brigada Virina Kongreso, gvidas virinojn en lernado d








ro 193 de la Dua Oleekspluatejo de Karamai-
oletavolo kune kun siaj kamaradoj.

ij-brigado, Hijang-gubernio, kaj estrino de la
do de la historio de batalo inter la du linioj.





Membroj de la partia komitato de Ginĉeng-gubernio profundiĝas en mekanikan fabrikon por pristudi produktajn problemojn kune kun laboristoj.

Li Bingbi, sekretario de la partia filio de Nanĉeng-brigado, gvidas komunumanojn al fosado de lageto por konservi akvon.





Li Ŝijing, heroo de la aera armeo, presistas en komandado de militaj aferoj por direktado de flugado.




Dunĝuban-ĝiaŭ (dekstre), tibeta komunisto, en raportkunveno pri aplikado de Maŭzedongpenso.

Kamarado Fan Caj, hardita en militfajroj, ĉiam konservas sian stilon de penema luktado en malfaciloj.





Vang Bo, flegistino de la Unua Hospitalo de Gilin-a Medicina Universitato, atingis bonajn rezultojn en apliko de filozofia penso de Prezidanto Maŭ en reserĉo de nova kuracarto.




# Daj Hiangmej Nun Scipovas Apliki Dialektikon



*Daj Hiangmej, vicsekretario de la partia filio de Kingian-brigado*

DAJ Hiangmej, vicsekretario de la partia filio de Kingian-brigado de Giangŝan-gubernio, Ĝegiang-provinco, tiel multe suferis en la malnova socio, ke estas neeble finrakonti la klasajn turmentojn kaj sangajn subpremojn suferitajn de ŝi. Prezidanto Maŭ savis ŝin el la maro de mizero kaj ŝi estas senfine fidela al li. Ŝi tamen renkontis multajn problemojn en sia laboro, kiujn ŝi ne povis bone solvi.

En iu jaro, por faciligi kulturadon de la kolektivaj kampoj, la brigado decidis interŝanĝi parcelon private uzatan, kaj Hiangmej estis sendita por peti konsenton de la uzanto. Hiangmej interparolis kun la lasta kaj foriris de li antaŭ ol li esprimis konsenton, ĉar ŝi pensis, ke individua intereso devas submetiĝi al tiu de la kolektivo, do ne necesas multa klarigo. La komunumano tamen ankoraŭ ne tute konsentis pri tio.

La aferoj en la mondo tamen ne estas tiel simplaj kiel Hiangmej imagis al si. Tial, ĉiufoje kiam Hiangmej renkontis malfacilon en sia laboro, ŝi perdis paciencon kaj sentis miron: "Tiel multaj problemoj estas en revoluciado!" Por helpi ŝin kamarado Giang Ĵuvang, la sekretario de la partia filio, diris al ŝi pacience: "Ni kadroj devas ne nur kuraĝi fari revolucion, sed ankaŭ devas tion fari lerte, sekve do ni devas lerni materiisman dialektikon."



*Daj Hiangmej (maldekstre) laboras kune kun komunumanoj.*

Poste, Hiangmej lernis filozofion kaj ekscipovis apliki dialektikon. Ŝi komprenis, ke problemoj estas kontraŭdiroj kaj por fari revolucion kompartianoj devas rekoni, analizi kaj solvi problemojn, kiuj ekzistas ĉie. Por fari revolucion, oni devas havi ne nur energion sed ankaŭ metodon, nome dialektikon.

De tiam, Hiangmej ne plu miras kaj malpaciencas ĉe renkonto de problemo, sed ŝi unue ĝin analizas dialektike kaj poste klopodas ĝin solvi.

Iutage, kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sin okupis pri falĉado, iu komunumano diris kun nedetenebla ĝojo pro la riĉa rikolto: "Restas nur centono de la vojo, do ni jam povas ĝueti ripozon!"

Liaj vortoj iom surprizis Hiangmej. Se tio okazus en la pasinteco, Hiangmej jam estus lin refutinta senhezite. Ĉifoje Hiangmej tamen englutis siajn vortojn kaj post ripetfoja analizo ŝi kondukis la estron de la produkta grupo kaj la diritan komunumanon al riĉrikolta kampo kaj demandis: "Nu diru, ĉu tiu ĉi kampo donas pli aŭ malpli multe da rikoltaĵo?"

La grupestro diris: "Sendube ĝi donas riĉan rikolton." Kaj poste li kalkulis, je kiom da kilogramoj da greno ĝi pliproduktos ol en la pasintaj jaroj.

Montrante al du vicoj da malbone kreskantaj rizplantoj, Hiangmej diris: "Vidu, ĉi tiuj du vicoj da rizplantoj estas difektitaj de fiinsektoj. Ĉu tio ne kaŭzos redukton en produkto?"

Ankaŭ aliaj komunumanoj laborantaj en la kampo komencis diskuton pri tio. Malriĉkamparano Giang Ŝengde faris kalkulon parolante al si mem:

"Jes, la du vicoj konsistas el pli ol cent tufoj, ĉiu tufo povas doni 1 uncon da greno kaj la du vicoj povas doni entute dekkelkajn ĝinojn da greno. Se la plantoj ne estus difektitaj de fiinsektoj, oni povus ricevi ankoraŭ pli multe da rikoltaĵo!"

"Jes!" diris Hiangmej. "Aferoj ĉiam dividiĝas unu en du, kaj krom la ĉefa fluo sin trovas ankaŭ branĉa fluo. En ĝeneralo, ĉijare agrikulturo akiris pliprodukton, tio estas la ĉefa fluo; sed en la pliprodukto troviĝas ankaŭ redukto de produkto, kaj tio estas branĉa fluo. Ni devas plene taksi la ĉefan fluon kaj kuraĝigi la komunumanojn per la riĉa rikolto; ni tamen ankaŭ ne devas neglekti la branĉan fluon! Ni devas vidi, ke ankoraŭ troviĝas multaj mankoj en nia laboro. Kaj la ĉefa fluo kaj branĉa fluo povas turniĝi unu en la alian. Se oni ne bone solvas la problemon de branĉa fluo, tiam ĝi povas turniĝi en ĉefan fluon. Kvankam nun riĉa rikolto jam estas videbla, tamen tio ankoraŭ ne signifas ke riĉa rikolto jam estas efektivigita. Kial do oni povas diri ke restas nur centono de la vojo kaj ni jam povas ĝueti ripozon?"

La vortoj de Hiangmej klarigis la menson de la komunumanoj, tiel ke ili opiniis, ke ŝi diris prave kaj oni ne devas malstreĉi sian strebadon.

Hiangmej ofte diris, ke por bone plenumi sian laboron oni ne povas malhavi dialektikon; ankaŭ por fari revolucion al sia egoismo oni ne povas malhavi dialektikon.

En la komenca periodo de la Granda Proleta Kultura Revolucio, Daj Hiangmej estis kritikita de amasoj kaj iom plendis pro tio, ke ŝi ricevis por sia penema laborado por la revolucio multe da kritikoj. Kamarado Giang Ĵuvang korverŝe interbabilis kaj studis kune kun ŝi instruon de Prezidanto Maŭ "**Estas erare rigardi nian laboron el vidpunkto ĉu ĉion aprobanta ĉu ĉion malaprobanta.**" Ĵuvang diris: "Ni estas kompartianoj kaj estis nia devo, ke ni faris iom da laboro en la pasintaj dekkelkaj jaroj kiel kadro; kaj dume ni certe faris nemalmultajn erarojn, kiujn ni ja devas korekti! Oni devas teni la vidpunkton dividi unu en du ankaŭ koncerne al si mem!" Hiangmej retrorigardis sian laboron en la pasintaj dekkelkaj jaroj kaj trovis ke ŝi vere faris multajn erarojn. Sed kial ŝi ne pensis pri tio antaŭe? Ĉar ŝi ne tenis la vidpunkton dividi unu en du koncerne al si mem. Ŝi vidis nur sian bonan klasan naturon kaj altan revolucian entuziasmon, sed ne la burĝaran ideologian influon al si en la socio; ŝi prenis sin nur kiel movforton revolucian, sed ne objekton de revolucio. Se ŝi ne aŭskultus kritikojn de la amasoj, ŝi povus misgvidi ilin, fari grandan eraron kaj kaŭzi seriozan perdon al la afero de la Partio, kvankam fari eraron ne tiel gravas por persono!

Solviĝis la problemo en ŝia penso, ŝi kuraĝe iris inter la amasojn por fari memkritikon, persistante en bono kaj korektante erarojn por la interesoj de la popolo. En la partio-ordiga movado en la pasinta jaro, la amasoj faris tre malmultajn kritikojn al ŝi.

Kaj kian sintenon Hiangmej havis koncerne al sia progreso?

Iuvespere, post la fino de studrondo por la partio-ordigo, Ĵuvang kaj Hiangmej kune eliris el la kunvenejo.

"Ĵuvang, ĉifoje la ordigo tre maltrankviligis min!"

"Kial?"

"Estas nebone, ke la amasoj ne faris multajn kritikojn al mi!"

"Ho jes, ili ne faris multajn kritikojn ankaŭ al mi!"

"Mi pensas, ke oni devas fari analizon al la konkretaj kazoj de 'multeco de kritikoj' kaj 'malmulteco de kritikoj'. La multeco de kritikoj povas montri pli da mankoj kaj eraroj, sed ne ĉiam tiel. La malmulteco de kritikoj ne signifas, ke ni ne faris erarojn. Oni devas ankaŭ konsideri la naturon de la kritikoj. Se la amasoj faris multajn kritikojn al mi, ili povas per tio puŝi min, ke mi faru revolucion al mi mem; dum malmulteco de kritikoj povas malklarigi mian penson!"

"Prave!" diris Ĵuvang. "Kaj krome, 'multeco de kritikoj' kaj 'malmulteco de kritikoj' turniĝas unu en la alian. La amasoj faris multajn kritikojn al vi, kaj tamen nun iliaj kritikoj estas malmultaj, ĉu ne?..."

Hiangmej interrompis la vortojn de Ĵuvang: "Se mi nun fieriĝus, do 'malmulteco de kritikoj' turniĝos en 'multecon de kritikoj'."

Ĵuvang diris: "Tial do ni ne devas kontentiĝi pri la 'malmulteco de kritikoj'. Se nur ni persistos en viva studo kaj viva apliko de la filozofiaj verkoj de Prezidanto Maŭ, senĉese faros analizon dividante unu en du pri ni mem kaj revoluciigados nian ideologion, ni do povos senĉese antaŭenmarŝi sekvante Prezidanton Maŭ!"

Nun, ankoraŭ pli diligente Daj Hiangmej studas la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj ŝia revolucia spirito ankoraŭ pli vigliĝas.

# *Lerni Unu de Alia, Akceli la Amikecon*


## —Pri vizito de la alilandaj tablotenisaj delegacioj al nia lando

POST la sukcesa fermiĝo de la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso, ekde la naŭa de aprilo ĝis la dua de majo, tablotenisaj delegacioj de iuj landoj unu post alia venis laŭ invito al nia lando por amika vizito.

Tiuj delegacioj estis: La Kanada Tablotenisa Delegacio estrata de Margaret Walden, ĉefsekretario de la Kanada Tablotenisa Asocio; la Kolombia Tablotenisa Delegacio estrata de Pedro Garcia, membro de la gvidantaro de la Kolombia Tablotenisa Federacio kaj prezidanto de la Bogota Tablotenisa Asocio; la Angla Tablotenisa Delegacio estrata de Charles Murton Wyles, prezidanto de la Angla Tablotenisa Asocio; la Niĝeria Tablotenisa Delegacio estrata de Adegboyega Adebowale Efunkoya, prezidanto de la Niĝeria Tablotenisa Asocio; la Aŭstralia Tablotenisa Delegacio estrata de John Jackson, prezidanto de la Aŭstralia Tablotenisa Asocio kaj la Usona Tablotenisa Delegacio estrata de Graham Steenhovan, prezidanto de la Usona Tablotenisa Asocio.

Dum sia vizito al nia lando, tiuj tablotenisaj delegacioj estis varme bonvenigataj kaj entuziasme akceptataj de niaj popolanoj kaj sportistoj. Ili faris amikajn konkursojn kun niaj tablotenisaj sportistoj, pririgardis niajn urbojn Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Kantono kaj vizitis la Grandan Muron, la Imperian Palacon, la Someran Palacon kaj aliajn pitoreskejojn kaj historiajn vizitindejojn. Tiuj amikaj konkursoj kaj vizitoj pluapaŝe akcelis la amike-

*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj intervidiĝas kun la tablotenisaj delegacioj de Kanado, Kolombio, Anglio, Niĝerio kaj Usono.*





*La Kanada Tablotenisa Delegacio vizitas la Someran Palacon de Pekino.*


con kaj reciprokan kompreniĝon inter la vizitantaj diverslandaj sportistoj kaj niaj sportistoj kaj popolanoj.

En la 14-a de aprilo, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj intervidiĝis kun la tablotenisaj delegacioj de Kanado, Kolombio, Anglio, Niĝerio kaj Usono kaj en la unua de majo kun la Aŭstralia Tablotenisa Delegacio. Li esprimis bonvenigon al la vizitantaj delegacioj en la nomo de niaj popolo kaj registaro, havis kun ili amikan konversacion kaj fotiĝis respektive kun la delegacioj.

Novaĵistoj de Kanado, Anglio, Usono kaj Japanio venis kun la delegacioj al nia lando por raporti pri iliaj aktivadoj.


*La kolombia tablotenisa delegacio estas varme bonvenigata okaze de sia vizito al pekina kotonŝpinejo.*






*Amikeca maĉo inter niaj kaj anglaj sportistinoj.*

*Ĉina kaj niĝeria sportistoj lernas unu de la alia.*





*La aŭstralia tablotenisa delegacio rigardas la konstruan modelon de la Daking-a Olekampo en la Kantona Foiro.*

*Ĉinaj kaj usonaj tablotenisistinoj vizitas la Someran Palacon.*



Inter Amikoj

# Fremdlandaj

# Maristoj en Ĉinio

KUN la vigla disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj ĉiam pli multaj internaciaj kontaktoj de nia lando, multaj fremdlandaj ŝipoj venas ĉiujare al niaj marhavenoj, kiel Ŝanhajo, Kantono, Kingdaŭ, Tiangin kaj Dalian. Maristoj el diversaj partoj de la mondo havas vastajn kontaktojn kaj starigis profundan amikecon kun nia popolo.

## LA LABORANTA POPOLO EN LA TUTA MONDO ESTAS SAMFAMILIANOJ

En Dalian, nigrula maristo el Afriko iuvespere eniris en manĝejon de la Daliana Kompanio de Provizado al Fremdlandaj Ŝipoj, kaj silente sidiĝis en iu fora angulo. Laboranto de la manĝejo tuj varme salutis lin kaj invitis lin sidi ĉe plej hela sidloko, demandante lin pri liaj preferoj kaj intime interparolis kun li. En la 4 sekvintaj tagoj, dum kiuj tiu maristo restis en la haveno, li kvarfoje venis manĝi en la manĝejo. En la lasta vespero, kiam finiĝis la labortempo kaj klientoj-maristoj foriris unu post alia, tiu nigrula maristo iris al la laborantoj kaj firme manpremis al ĉiuj dirante kun larmoj: "Mi jam foriros, vi ĉina popolo traktas ĉiun homon egale. Kaj mi sentas plej grandan feliĉon kaj var-

*Somaliaj maristoj studas verkon de Prezidanto Maŭ.*



mon inter vi." La laborantoj de la manĝejo tre emociiĝis de lia profunda amikeco, kaj ripete respondis: "La laboranta popolo en la tuta mondo estas samfamilianoj. Ni estas amikoj kaj fratoj!"

En la legoĉambro de la marista klubo en Dalian, maljuna brita maristo diris kun emocio al ĉinaj laborantoj: "Antaŭ dekoj da jaroj mi foje venis al Ĉinio kaj vidis ke la fremdaj agresantoj kaj enlandaj reakciuloj senbride piedpremas vian popolon. La popolo vivis mizere, kaj troviĝis ĉie sur la stratoj almozuloj kaj publikulinoj. Dum mia nuna vizito al la nova Ĉinio, mi povas vidi, ke la prezoj en via lando estas stabilaj, la produkto multe disvolviĝis, la popolo estas plena de ĝojo kaj la sociaj moroj estas tre bonaj. La kontrasto inter la nova kaj la malnova socioj estas sama kiel tiu inter la ĉielo kaj la tero. Mi ja ne atendis, ke la nova Ĉinio akiris tiel grandajn atingojn en 21 jaroj post sia fondiĝo." Li aĉetis la 4 volumojn de la angla traduko de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, kaj diris kun ili en siaj manoj: "El tiuj ĉi grandaj verkoj, mi volas scii kiel Prezidanto Maŭ gvidis la ĉinan popolon en revoluciado."

## RECIPROKE LERNI KAJ HELPI KUN MODESTECO

Antaŭ nelonge, iu somalia varŝipo ankris en Ŝanhajo. Post la laborhoroj la somalia elektristo A. pretis iri surborden kun siaj kunuloj por sin distri. Kiam li eliris el la kajuto, li trovis, ke la doko bolis en okupateco kaj aktiveco de la laboristoj kaj bruego de maŝinoj. La laboristoj de la haveno ja decidis antaŭdate plenumi la malŝarĝan taskon de tiu 10,000-tonela varŝipo por renkonti la Unua-Majan Feston de batalo kaj unuiĝo de la tutmondaj proletoj per sia konkreta ago.

A. estis tre emociita de la spirito de la ĉinaj laboristoj kaj diris al siaj kunuloj: "Ni batalu kune kun la ĉinaj laboristoj!" Momenton poste li alkondukis kelkajn aliajn maristojn por partopreni en la malŝarĝa laboro foroferante sian ripoztempon. La dok-laboristoj kortuŝitaj de la internaciisma spirito de tiuj fremdlandaj maristoj, kaj plenaj de emocio ili laŭte kriis: "Lernu de niaj fremdlandaj amikoj!" "Salutojn al niaj fremdlandaj amikoj!" Kun la helpo de la fremdlandaj maristoj, la varŝipo estis malŝarĝita en nur 22 horoj. A. premis firme la manon al iu ĉina laboristo kaj diris: "Ni estas kunbatalantoj sur la komuna fronto. Ni sentas feliĉon kaj gloron, ĉar ni povas malŝarĝi la ŝipon kune kun ĉinaj laboristoj hodiaŭ por saluti la 'Unua-Majan Feston'!"

## ANTAŬENMARŜO KUNE EN LA BATALO KONTRAŬ LA USONA IMPERIISMO

Multaj fremdlandaj maristoj vojaĝas tra oceanoj vizitante multajn landojn jaro post jaro. Ili propraokule vidis la batalojn kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj leviĝantajn ĉie, de Azio, Afriko kaj Latinameriko ĝis Norda Ameriko, Okcidenta Eŭropo kaj Oceanio. Dum sia restado en Ĉinio, ili ofte uzis sian ripozan tempon por rakonti al laborantoj de niaj havenoj kion ili vidis kaj aŭdis aliloke por akuzi la agresajn krimojn de la usona imperiismo kaj raporti pri la bonega situacio de la monda revolucio. La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! Tiun ĉi komunan kredon ofte esprimis kune la vastaj amasoj de dok-laboristoj de nia lando kaj maristoj el diversaj lokoj tra la mondo. La dok-laboristoj en la Tiangina nova haveno ankoraŭ klare memoras la kortuŝan scenon en la 20-a de majo pasintjare. En tiu tago nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigis sian solenan deklaron *Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn!*, la dok-laboristoj tuj organizis grandiozan manifestacion por varme subteni la deklaron. Tiam multaj fremdlandaj maristoj staris sur la ferdekoj de oceanaj ŝipoj kaj mansvingis foje kaj refoje al la manifestaciantoj por esprimi sian subtenon. Iuj el ili eĉ partoprenis la manifestacion.

Kuraĝigite de la solena deklaro de Prezidanto Maŭ publikigita en la dudeka de majo, fremdlandaj maristoj venintaj el batalfronto kontraŭ imperiismo plifortigis sian fidon pri la batalo. Lastatempe, iu fremdlanda ŝipo, kiu forlasis Ŝanhajon, plenŝarĝita de materialoj de la ĉina popolo por helpi la popolojn de Hindoĉinio en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso, kaj veturis antaŭen kontraŭ la vento kaj la ondoj. Subite, ĝia maŝino paneis. Kion fari? Riparado en proksima haveno malfruigus la tempon de atingo de tiuj materialoj al la manoj de la destinito. Tiumomente, la maristo H. sur la ŝipo rekte alkuris en la varman maŝinkajuton, faris intensan riparadon kaj veldadon kune kun aliaj maristoj, kaj fine rebonigis la difekton. Dank' al tio la ŝipo atingis la destinitan havenon unu tagon antaŭdate kaj venke plenumis la taskon de transporto.

# Amikeca Interviдiĝo

*— Pri la vizito de finnlandaj esperantistoj al Ĉinio*



EN majo 1971 delegacio de Finnlanda-Ĉina Societo kun s-ro Vaho Ralevi Rasanen, vicprezidanto de la supredirita societo, kiel ĝia estro kaj s-ro Tarja Sinikka Korhonen, ĝenerala sekretario de tiu societo, kiel ĝia vicestro venis al Ĉinio por fari viziton. Inter la membroj de la delegacio estis du esperantistoj — s-ro Ahto Linja (meze en la suba foto) kaj s-ro Martti Leinonen (apud li).

La delegacio atingis Pekinon en la posttagmezo de la 25-a de majo, kaj ilin bonvenigis ĉe la stacio la respondeculoj de koncernaj departementoj de Ĉinio kaj parto de la Esperanto-laborantoj de Pekino. En la vespero la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Eksterlando kaj la Ĉefa Oficejo de la Ĉina Internacia Turisma Servo donis bankedon por honoro al la delegacio.

En la 26-a la du finnlandaj esperantistoj intervidiĝis kun parto de la Esperanto-laborantoj de la Redakcio de El Popola Ĉinio, la Fremdlingva Eldonejo kaj la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo. En atmosfero de varma amikeco ili longe interbabilis kaj kune kantis ĉinajn revoluciajn kantojn. Poste ili interŝanĝis valorajn memoraĵojn. Laŭ la peto de la Esperanto-laborantoj de Pekino la du finnlandaj esperantistoj promesis transdoni iliajn amikajn salutojn al la popolo de Finnlando, la estraro de Esperanto Asocio de Finnlando kaj ĉiuj finnlandaj esperantistoj.

Kune kun la aliaj membroj de la delegacio, s-ro A. Linja kaj s-ro M. Leinonen vizitis, krom Pekino, ankaŭ Ŝanhajon, Nankinon, Vuhan, Ĉangŝa kaj Pinghiang, kaj ili veturis al Ŝaŭŝan por viziti la antaŭan loĝejon de Prezidanto Maŭ. Tiuj ĉi amikoj el malproksimo vidis kun granda intereso la brilajn atingojn, kiujn la ĉina popolo sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ efektivigis en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj en la socialisma konstruado.

La vizito de la delegacio de Finnlanda-Ĉina Societo kaj la du finnlandaj esperantistoj plue plifortigas la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Finnlando kaj pliantaŭenigas la amikan interkomunikadon inter la ĉinaj kaj finnlandaj esperantistoj.



LIN VEN:

# Impetas la Gilin-a Termoelektrejo

PROMENANTE sur la pontego super Songhua-rivero en la urbo Gilin, oni povas vidi la altajn fumtubojn de la Gilin-a Termoelektrejo, kiu ellasas blankan fumon; gigantaj feraj latisturoj kondukas alttensiajn fadenojn trans montojn al malproksimaj urboj kaj vilaĝoj; vagonaroj plenŝarĝitaj per karbo senĉese rapidas sur la speciala fervojo de la fabriko...

La Gilin-a Termoelektrejo estas unu el la plej grandaj termoelektrejoj en nordorienta Ĉinio. Ĝia tasko estas provizi elektron kaj vaporon (por industrio). Sen aldono de ekipaĵoj kaj post redukto de la laborantoj, la fabriko sukcesis altigi la kapacitojn de elektro kaj varmo produktitaj de ĝi respektive je 32% kaj 25%, kaj tio egalas al starigo de plia mezgranda termoelektrejo por la ŝtato. La konsuma kvanto de karbo en produktado multe malgrandiĝis kaj pli ol 300,000 tunoj da karbo estis ŝparitaj en unu jaro por la ŝtato.

## I

La Gilin-a Termoelektrejo estas granda fabriko, kiu komencis produkti en la periodo de la Unua Kvinjara Plano. Ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estas importitaj kaj ĝia tuta administra sistemo estas stereotipe transprenita el fremdlando. Longe sub la influo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, la fabriko malpermesis fari ian ajn reformon al iuj ĉefaj ekipaĵoj kaj rigardis iujn teknikajn normojn kiel "ekstremojn" kaj malpermesis superi ilin. Tio serioze malhelpis la disvolviĝon de produkto. Dank' al puŝado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la industria kaj agrikultura produktado vigle disvolviĝas kaj postulas pli multe da elektro de la elektrejo. Vizaĝe al tiu nova situacio, la vastaj amasoj de laboristoj de la elektrejo diris decideme, ke ili nepre plene ekspluatos la latentan produktivon de la entrepreno por produkti pli multe da elektro kaj pli multe da varmo por kontentigi la bezonojn de la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produkto. Iuj homoj tamen opiniis, ke jam ne troviĝas latenta produktivo ekspluatebla.

Je tia kazo, la revolucia komitato de la elektrejo gvidis la amasojn disvolvi, kun la batalo inter la du linioj kiel la ĉefan ĉeneron, debaton pri la problemo kiel produkti pli multe da elektro konforme al la disvolvo de la industria kaj agrikultura produkto. En la debato, alte tenante la standardon de revolucia amasa kritikado, la laboristoj forte kritikis la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn varojn kiaj kompradora filozofio kaj rampismo, distrumpetitajn de Liu Ŝaŭki, kaj rezulte de tio oni komprenis, ke la asertoj, ke la nominala kapacito ne povas esti superita kaj jam ne estas latenta produktivo, estas metafizikaj kaj ili spegulas, ke la venena influo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio ankoraŭ ne estas komplete likvidita. La vastaj revoluciaj amasoj unuanime opiniis, ke oni povas plene disvolvi la avantaĝojn de socialisma entrepreno kaj senĉese ekspluati la latentan produktivon de granda moderna entrepreno, nur se oni rompos la "malpermeson" kaj superos la "ekstremon".

Post eduko pri batalo inter la du linioj, la aktiveco de la laboristoj de la tuta elektrejo estas plene movita. Sed kien oni metu la fortojn kaj kiel ekspluatu la latentajn povojn? Tiam la revolucia komitato de la elektrejo gvidis la laboristojn disvolvi eksperimentajn aktivadojn. Ili starigis eksperimentan grupon de "triflanka kombiniĝo" konsistantan el laboristoj, kadroj kaj teknikistoj kun la antaŭaj kiel la ĉefa parto. Unue ili elektis vaporturbinan generatoron por fari eksperimenton pri produkto de elektro je supernominala kapacito. Post ripetada praktiko, oni iom post iom trovis vojon por produkti elektron je supernominala kapacito kaj altigis la produktivon de tiu generatora kompleto per 40%. Tiu sperto estis ĝenerale disvastigita en la tuta elektrejo kaj leviĝis amasaj eksperimentaj aktivadoj pri produkto de elektro je supernominala kapacito. La laboristoj ĝenerale



*La teknika renoviga grupo de triflanka kombiniĝo el laboristoj, teknikistoj kaj kadroj interkonsiliĝas por renovigi generatoron.*

faris eksperimentojn al ĉiuj maŝinoj, de la ĉefa maŝino ĝis la helpa maŝino, de la kaldronego ĝis la pumpilo, kaj rezulte de tio, ili trovis multajn mankojn ĉe la t. n. "avangardaj" ekipaĵoj kaj teknikaj difinoj kaj ĉerpis grandan kvanton da latenta produktivo. Kaj poste, dank' al teknika renovigo kaj eksperimentoj, la produktokvanto de la elektrejo estis plialtigita je 20%, sen aldono de ekipaĵoj kaj laborantoj.

II


Dank' al la eksperimento pri produkto de elektro je supernominala kapacito, oni ne nur altigis la produktokvanton de elektro, sed ankaŭ eltrovis la ĉefajn problemojn ekzistantajn en la ekipaĵoj kaj pretigis favorajn kondiĉojn por reformi la ekipaĵojn kaj ĉerpi pli grandan latentan produktivon. Tiam la revolucia komitato de la elektrejo gvidis la amasojn fari teknikan renovigon al la modernaj ekipaĵoj.

La ŝlosila problemo en reformo de generatoro estas venki varmegon. Por malaltigi la varmon de generatoro, laboristoj proponis instali al ĝi malgrandan ventumilon. Sed iuj diris laŭ opinio de "aŭtoritatulo", ke tio ne taŭgas, kaj ne subtenis ĝin. Laboristoj akre kritikis ilin dirante: Sur kiuj ja vi vin apogas, se vi ne aŭskultas niajn opiniojn sed nur kredas la dirojn de "aŭtoritatuloj"? La fakto, ke jam multajn jarojn sekure laboris la akvopumpilo kun minuta rapideco de 3,000 rivoluoj al kiu laboristoj aldonis ventumilon, donis bonan instruon al tiuj, kiuj ne kredis al la amasoj, tiel ke ili forlasis sian eraran opinion, akceptis la proponon de la laboristoj kaj kune kun ili sin ĵetis en la batalon por instali ventumilon. Dank' al kuna klopodado de 15 tagoj, ili sukcesis elfari malgrandan ventumilon, faris provan funkciigon kun minuta rapideco de 4,000 rivoluoj kaj sukcese ĝin fiksis sur la generatoron. La ventumilo sekure funkcias kun tre bona efiko de malaltigo de la temperaturo.

Tiu fakto donis vivecan lecionon al la kadroj kaj amasoj de la tuta elektrejo.

Post altigo de sia kono, ili senrezerve mobilizis la amasojn por kune ellabori reformajn projektojn pri la ŝlosilaj partoj de la ĉefaj ekipaĵoj kiaj vaporturbino, generatoro kaj kaldronego. Poste oni faris komparadon inter la projektoj kaj elektis el ili la plej raciajn. Kaj el pli ol 30 projektoj por reformo de generatoro oni elektis la plej bonan. Post ellaboro de racia projekto, la vastaj amasoj de laboristoj aktive sin ĵetis en batalon por reformo de ekipaĵoj. Krom malaltigo de la temperaturo

de la generatoroj per instalo de ventumiloj, la elektraj laboristoj ankaŭ anstataŭigis la aeran malvarmigan sistemon per hidrogena kaj per tio pliapaŝe altigis la produktivon. La vaporturbinaj laboristoj pligrandigis la enlasajn truojn de la vaporturbinoj por pligrandigi la eniran kvanton de vaporo kaj altigi la kapaciton de la maŝino. Por provizi per pli multe da vaporo, la kaldronaj laboristoj reformis la sistemojn por provizo de vaporo, produkto de karbopulvoro kaj konduko de vaporo.



*La Gilin-a Termoelektrejo*

En la batalo por reformo de ekipaĵoj, la laboristoj de la tuta elektrejo disvolvis la revolucian spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj kaj laŭeble ne petas helpon de la ŝtato. Por anstataŭigi la aeran malvarmigan sistemon de la generatoro per hidrogena malvarmiga sistemo, pli ol tridek tunoj da ŝtalo estis bezonataj laŭ antaŭa plano; sed poste dank' al praktiko de la principo laŭeble uzi surogatojn kaj ŝpari materialon, nur dekkelkaj tunoj da ŝtalo estis uzitaj.

Post grandskala reformado en unu jaro, la produktivo de elektro de la elektrejo ankoraŭ pli altiĝis kaj superis la projektitan normon je pli ol 30%.

III

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Kontraŭdiroj seninterrompe aperas kaj estas seninterrompe solvataj, tio estas la dialektika leĝo de la disvolviĝo de aferoj."** La vaporturbinoj, generatoroj, kaldronegoj kaj la provizaj sistemoj de akvo kaj karbo de la Gilin-a Termoelektrejo formas, kiel ĉeneroj interligitaj, unu tuton por kontinua produktado. Sekve de la altigo de la kapacitoj de la vaporturbinoj, generatoroj, kaldronegoj kaj aliaj ĉefaj ekipaĵoj, detruiĝis la antaŭa ekvilibro en produkto, kaj la helpaj sistemoj por provizo de akvo kaj karbo fariĝis malfortaj ĉeneroj, kiuj ne povis kontentigi la bezonojn de la ĉefaj maŝinoj. Kun tiu nova problemo, la membroj de la revolucia komitato de la elektrejo iris profunde en ĉiujn helpajn sekciojn por restarigi ekvilibron pozitivan.

La Ĥemia Filia Fabriko, kiu plenumas la taskon de liverado de akvo al la tuta elektrejo, foje faris reformon kaj jam iom altigis la provizan povon de akvo. Iuj gvidantoj de tiu fabriko opiniis, ke ili jam faris grandan klopodon por atingi la nunan nivelon, do jam estos sufiĉe bone, se ili povos tenadi ĝin je tiu normo. Alveninte al tiu fabriko, membro de la revolucia komitato helpis ĝiajn gvidantojn vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, elimini la inklinon de kontentiĝo al la ekzistanta stato kaj samtempe kune kun ili gvidis la laboristojn fari teknikan renovigon. Ili prenis la ŝlosilan ekipaĵon precipitilon por fari eksperimenton pri altigo de la proviza povo de akvo. Ili reformis la internan strukturon de la precipitilo kaj altigis la provizan povon de akvo je pli ol 50%. Kaj poste, ili solvis la problemon de malpureco de akvo post ĉirkaŭ cent eksperimentoj, multe altigis la kvaliton de la akvo kaj kontentigis la bezonon de akvo en produkto de elektro kaj vaporo.

Samtempe kun tio, ankaŭ la revoluciaj amasoj de la sekcio de karboprovizo klopodis ĉiamaniere por trovi fonton kaj ŝpari karbon. Por utiligi forĵetaĵon de iu frata fabriko en la ĉirkaŭaĵo, ili propramane starigis karboŝliman laborejon kaj dank' al uzo de karboŝlimo kune kun bonkvalita karbo en la elektroprodukto, ili ŝparis grandan kvanton da bonkvalita karbo por la ŝtato.

HONG MEJ:

# Ministoj en Pasinteco kaj Nuno

FUŜUN en nia Nordoriento estas konata kiel "urbo de karbo", sub kies tero abundas karbo.

Hodiaŭ, en la minejoj oni povas vidi altajn kaj larĝajn ĉefgaleriojn konstruitajn per ferbetono kaj iluminatajn per eksplodpreventaj fluoreskaj lampoj. Multaj branĉaj galerioj kondukantaj al ĉiuj fosejoj rete kruciĝas. Potencaj ventoliloj senĉese enblovas freŝan aeron kaj elpuŝas la malpuran. En tiuj bonaj kondiĉoj, la ministoj klopodas pliprodukti karbon por subteni la socialisman konstruadon de la Patrio. Ekde 1968, la minejoj de Fuŝun superplenumis la ŝtatan planon en tri sinsekvaj jaroj kaj la tasko de la unua sezono de la kuranta jaro ree estis antaŭdate plenumita.

## SEKURECO DE LA MINISTOJ GARANTIATA

La minejoj de Fuŝun havas historion de pli ol 60 jaroj. Antaŭe sub la regado de la japanaj agre-

*Gvidanto de la Fuŝun-mineja Administracio venas en ŝakton por fari korverŝan parolon kun ministoj.*




santoj, pupa reĝimo kaj kuomintangaj reakciuloj, la minejoj formis surteran inferon. Tiam la kondiĉoj de karbofosado estis tre malbonaj kaj ĉiutage okazis akcidentoj de gaseksplodo, galeria fajro, inundo aŭ plafonfalo. Inter 1916 kaj 1944, pro akcidentoj rezultis mortoj kaj vundoj de 250 miloj da homfojoj, meznombre pli ol 20 en ĉiu tago. Inter ministoj cirkulis la kanto:

*En karbminejo ĉiam regas mortdanĝero,*
*Okazas daŭre akcidentoj ja sen ĉeso.*
*Se panon serĉi tie estas la neceso,*
*Vi estu preta pagi ĝin per vivofero.*

Inter la akcidentoj la plej katastrofa estas gaseksplodo. Gaso kaŝas sin en karbotavoloj; kiam ĝi liberiĝas dum fosado, ĝi miksiĝas kun la aero kaj tuj eksplodas pro malgranda fajrero, se la enteno de gaso en la aero superas certan limon. Kaj la minejoj de Fuŝun estas fame konataj pro abunda enteno de gaso en karbotavoloj, kaj aldone, pro senplana elfoso de karbo fare de la japanaj agresantoj, pupa reĝimo kaj kuomintangaj reakciuloj dum longa periodo, iuj galerioj falis kaj malhelpis la fluon de la aero kaj tiel pli kaj pli multe da gaso akumuliĝis ĉie en la minejo. En 1917, la gaseksplodo en iu minejo kaŭzis morton al 917 ministoj. En 1944, en alia minejo okazis 43 eksplodoj en unu tagnokto. Sed tiam la japanaj imperiistoj sciis nur furioze prirabi niajn mineralajn fontojn, ili ne nur tute malzorgis la sekurecon de la ministoj, sed eĉ faris sangan subpremon al la laboristoj, kiuj leviĝis brave fojon post fojo por batali kontraŭ la subpremo kaj ekspluato.

Oktobron de 1948, Fuŝun estis liberigita kaj la minejoj revenis en la manojn de la popolo. Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio tre zorgis la sekurecon de ministoj. Restarigante kaj disvolvante la konstruadon de la minejoj, la ŝtato ĉiujare asignis grandajn sumojn por plibonigi la sekurecajn instalaĵojn kaj laborkondiĉojn kaj multe atingis en organizado de la laboristoj por batali kontraŭ inundo, fajro, plafonfalo kaj gaseksplodo.


En la komenca periodo post la Liberiĝo la Mineekspluata Oficejo jam starigis organizojn por esplori la densecon de la gaso en ĉiuj galerioj de la minejoj kaj alprenis diversajn metodojn taŭgajn por diversaj statoj de la galerioj, kiel riparo de galerioj, plibonigo de ventolado, pliigo de aerfluo en ventolado, hermetika fermo per argilo kaj sablo de galerioj, kiuj emas kaŭzi naturajn membrulojn, kaj la jam eluzitaj galerioj, tiel ke neniam plu okazis akcidento de gaseksplodo.



*Ministoj pribrilas sin per transviola lumo en sanprotektejo.*

Veteranaj laboristoj kaj teknikistoj en kompakta kunlaboro cetere elpensis metodon per kiu ili deradike venkis la gason. Sur la bazo de la fakto, ke la gaso estas pli malpeza ol aero kaj povas leviĝi tra karbotavoloj, ili proponis per foso de galerioj super karbotavoloj kaj ŝakto por konduki la akumulitan gason supren al la surfaco de la tero.

La propono altiris grandan atenton de la ŝtato. Post sukceso en provado, la ŝtato ĉiujare asignis specialan sumon por eltiri la gason 3-5 jarojn antaŭ la komenco de fosado de novaj karbotavoloj. Nun la laboristoj anstataŭas ĝin per boro de truoj. La nova metodo ne nur estas pli sekura ol fosado de galerioj, sed ankaŭ rapidigas la laboron de antaŭellaso de gaso kaj reduktas la elspezon al sesono de la antaŭa, kaj krome la efikeco kreskis per 20%.



*Laboristoj de fabriko por karbominejaj sekurigaj instrumentoj kontrolas sian produktaĵon.*

Ĉiuj minejoj de Fuŝun nun aplikas la metodon de antaŭellaso de gaso kondukante ĝin el loko pli ol 500 metrojn sub la tero por servigi ĝin kiel naturan hejtaĵon al pli ol 30 miloj da familioj kaj krudmaterialon por fabriko de fulgo kaj formaldehido. Post ellaso de gaso, kio malebligis gaseksplodon, en la novaj minejoj oni povas libere uzi elektrajn instalaĵojn kaj dinamitan metodon en fosado de karbo, tiel ke multe faciliĝis la laboro de ministoj kaj altiĝis la produkto de la minejoj.

## PLIIGO DE BONSTATIGAJ AFEROJ

Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**La popolamasoj posedas senliman krean povon. Ili povas organizi sin kaj marŝi al ĉiuj lokoj kaj fakoj, kie ili povas disvolvi siajn fortojn kaj marŝi al la profundeco kaj vasteco de la produktado por krei al si pli kaj pli multe da bonstatigaj aferoj**", la laboristoj de la minejoj de Fuŝun, per siaj saĝo, talento kaj diligentaj manoj, konstruis unun post alia fabrikojn por karbominejaj sekurigaj instrumentoj, karbominejaj elektraj maŝinoj, karbominejaj lampoj kaj starigis sciencan instituton kiuj fabrikas kaj esploras karbominejajn sekurigajn bezonaĵojn, instalaĵojn kaj instrumentojn. En 1970 kaj la tri unuaj monatoj de 1971, la scienca instituto pri karbo sukcesis en ses gravaj esploraj temoj pri sekura produktado. La sekura eksplodigilo projektita kaj fabrikita de la instituto estas ne nur tre efika, sed ankaŭ malgranda kaj malpeza. La laboristoj de la fabriko de instrumentoj produktis per siaj propraj fortoj pli ol 40 specojn de instrumentoj. La produkta kvanto de determiniloj de gasdenseco en la 4 jaroj de 1967 ĝis 1970 estas duoble pli granda ol tiu de la 10 jaroj antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, tre subevoluinta estis la produktado de karbominejaj sekurigaj instrumentoj, ekzemple mineja lampo, eksplodigilo, determinilo de gasdenseco. Post diligenta renovigo kaj kreo fare de la laboristoj, tiu stato estis radikale ŝanĝita. Nun en ĉiuj minejoj oni disponas sufiĉe multajn determinilojn de gasdenseco anstataŭ "gasdeterminajn lampojn" (uzatajn por determini la entenon de gaso en la aero laŭ grandeco de la flamo de la lampo kun rezulto ne preciza); fabriko de minejaj lampoj mem produktas longdistancan kaj malpezan lampon de nova tipo anstataŭ la importitajn malnovajn pezajn lampojn; ĉiuj maŝinaj kaj elektraj ekipaĵoj estas armitaj per eksplodevitaj instalaĵoj. Dum fosado oni ŝprucigas nebulon kaj akvon por faligi karbo- kaj ŝton-pulvoron.

La pli kaj pli bonaj laborkondiĉoj de ministoj tre emociis maljunajn laboristojn. Maljuna laboristo Sun Ŝufa de la karbominejo "Ruĝa Stelo" diris:


"En la aĝo de 12 jaroj mi fariĝis ministo. En la malnova socio por akiri panojn faritajn el kverksema faruno, ĉiutage ni devis brute laboregi 13-14 horojn sub la tero kun nuda korpo. Kapitalistoj donis al ni nur vimenan kaskon kaj pezan lampon kiu nur povis brili kelkajn horojn. En la dua jaro, post mia alveno al la minejo, japanaj diabloj kaj naciperfidaj laborestroj kredite vendis al mi paron da kaŭĉukaj ŝuoj el kruda tolo, kaj antaŭ ol la prezo estis repagita ili jam tute difektiĝis de frotado. Ni laboregis ĝis morta laciĝo unu monaton, sed ne povis pagi la paron da ŝuoj." La malbonegaj laborkondiĉoj subfosis la sanon de ministoj. El la ĝenerala ekzameno de sanstato de ministoj post la Liberiĝo, oni eksciis, ke multaj el la feliĉe postvivintaj ministoj, kiuj laboris en la malnova socio kiel ministoj, suferis de silikozo, stomakaj malsanoj, artrito kaj aliaj malsanoj kaj ricevis diversajn vundojn kaj kripliĝojn.

Nun por protekti la korpan kaj mensan sanon de ministoj, la ŝtato ĉiujare distribuas ĝustatempe al ministoj laborkostumojn, kaŭĉukajn botojn, lavtukojn, gantojn, sapojn kaj aliajn sume pli ol 90 specojn de laborprotektaj objektoj, laŭ malsamaj sezonoj kaj cirkonstancoj de la laborlokoj. Ĉiutage post laboro la ministoj povas ĝui sulfuran banon kaj pribrili sin per transviola lumo. Krom hospitaloj, sanatorioj kaj sanprotektaj stacioj servantaj al ministoj, la minejoj fondis rondirajn kuractaĉmentojn en minejoj kaj higienajn staciojn ĉe elirejoj de ŝaktoj. Laboristoj ĝuas senpagajn kuracon kaj ripozon en sanatorio. Laboristinoj kaj oficistinoj ricevas salajron dum ripozperiodo de akuŝo. La ŝtato tre zorgas pri emeritiĝintaj laboristoj kaj ofte sendas homojn por viziti ilin kaj porti al ili pension. Ĉiufoje, kiam maljunaj laboristoj parolis pri tio, ili sentas tre grandan emocion.

## SENĈESE PLIBONIĜAS LA VIVO

En la malnova socio, ĉiuj Fuŝun-aj laboristoj havas travivaĵon plenan de sango kaj larmoj. Maljuna ministo Maŭ Hinggiang havis 8 familianojn kiam ili venis al Fuŝun antaŭ la Liberiĝo, pro malsato kaj malvarmo, 4 el ili mortis en malpli ol unu monato. Kiam liberiĝis Fuŝun, restis nur lia patrino sola krom li mem. En la malnova socio, li laboris 11 jarojn en la minejo kaj restis al li nur malplena poŝo. Por pasigi vintron, li havis sole unu vatitan litkovrilon tute ĉifonan kaj pantalonon, sur kiu novaj flikaĵoj kovras la malnovajn. Ankaŭ aliaj laboristoj troviĝis en tia ekstreme malriĉa stato. Por oponi kontraŭ la kruela subpremo kaj ekspluato

*Nun oni konservas kaj liveras hejtan gason por la loĝantoj.*





*Parto de laborista loĝkvartalo*

de la japanaj agresantoj, la pupa reĝimo kaj kuomintangaj reakciuloj, la laboristoj faris multajn batalojn. Ekzemple en julio kaj aŭgusto de 1943, la grenvendejo starigita de la japanaj imperiistoj en la minejo Laŭhutaj vendis al laboristoj grenon miksitan kun sablo kaj akvo por trompi kaj ekspluati la laboristojn, kiuj, tre indignigitaj, unuiĝis kun aliaj laboristoj kaj ties familianoj en la sfero de dekkelkaj lioj, frakasis la vendejon kaj donis per tio fortan baton al la reakciuloj.

Post la Liberiĝo, dank' al la saĝa gvido kaj elkora zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la vivo de la ministoj radikale ŝanĝiĝis. Ni prenu la jam menciitan familion de Maŭ Hinggiang kiel ekzemplon. Nun li havas familion el 10 membroj. Tri el la infanoj havas profesion post diplomiĝo el lernejo. La ceteraj kvin geknaboj nun lernas en mezlernejoj kaj elementaj lernejoj. Al la familio mankas nek manĝaĵo, nek vestaĵo, kaj la familio havas ĉion necesan en ĉiutaga vivo kaj ĉiumonate ŝparitan monon. Ĝuante la nunan feliĉan vivon, Maŭ Hinggiang ne forgesas la klasan suferon kaj la sangan kaj larman maljustaĵon en la malnova socio. Li aktive partoprenas la revolucion kaj produktadon por kiel eble plej multe kontribui al la ŝtato. En 1952 li glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj en la komenco de la kuranta jaro estis elektita kiel membro de la partia komitato de la minejo. Multaj maljunaj ministoj, kiuj fariĝis mastroj de la ŝtato kiel Maŭ Hinggiang, nun partoprenas administradon de la minejoj en regpotencaj organoj de diversaj niveloj.

Kune kun la pliboniĝo de la vivo de ministoj, multe ŝanĝiĝis la fizionomio de kuraca kaj higiena afero. La minejo "Ruĝa Stelo" estas okulfrapa ekzemplo. En la pasinteco, la mineja regiono estis centro de mizero kaj malsano. En la areo kun diametro de dekkelkaj lioj loĝis kelkaj dekmiloj da ministoj kaj iliaj familianoj. Ili interpremiĝis en tre malaltaj kaj malvastaj domaĉoj kaj en unu tia domaĉo kun areo de malpli ol 30 kvadrataj metroj loĝis 40-50 homoj. Eksterdome ĉie stagnis haladza akvo kaj amasiĝis ruboj. La loĝantoj manĝis kverkseman farunon, kovris sin per jutsaka peco kaj dormis ofte sen litaĵoj. La malbonegaj viv- kaj loĝkondiĉoj kaŭzis senĉese cirkuladon de malsanoj. En 1942, epidemio atakis la tutan lokon. La damnindaj japanaj diabloj ne nur ne zorgis pri kuraco de la malsanuloj, sed sub la preteksto de "prevento de epidemio", ekzamenis devige per bajoneto la fekaĵon de ĉiuj homoj, sen diferencigo de viro kaj virino, maljunulo kaj infano. Se iu estis malsana, la tuta familio estis fermita en la loĝejo kaj mortis pro malsato aŭ de bruligo. Ĉie regis malgajo kaj dezerteco.

Post la Liberiĝo, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, tie nun jam formiĝis higiena reto kun la laborista hospitalo de minejo "Ruĝa Stelo" kiel centro. Sekvante instruojn de Prezidanto Maŭ, la kuracistoj kaj higienaj laborantoj tutkore servas al la ministoj kaj iliaj familianoj. Por doni oportunon al malsanuloj, ili kuracas malsanulojn en ilia hejmo kaj faras rondiran kuracon. Krom tio, ili starigis en loĝkvartaloj higienajn staciojn kun sufiĉaj kuracaj laborantoj. Ministoj kaj iliaj familioj povas ricevi akuratan kuracon ĉe malsaniĝo kaj povas ricevi oftan ekzamenon pri sanstato kaj preventi malsanon antaŭtempe. Nun la loko jam tute forigis epidemiojn cirkulintajn en la malnova socio. La oftaj malsanoj, kiuj minacas la sanon de ministoj, jam estas preventitaj aŭ akurate kuracitaj. Ministoj kun dankemo diris: "Ĉion ĉi tion ni dankas al Prezidanto Maŭ!"

JUAN FEN:

# Riĉa Rikolto de Kotono sur Montsupro

DAANTOŬ-BRIGADO de Jangĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco, situas sur Keluo-monto alta je pli ol mil metroj super la mara nivelo. Tial la montvilaĝo estas malproksima de trafikaj vojoj kaj havas malvarman klimaton kun senprujna periodo en ĉiu jaro nur de 140-150 tagoj. Tie oni neniam kulturis kotonon en la pasinteco. En 1963, Daantoŭ-brigado provis kulturi kotonon en 12 muoj da kampo sur Keluo-monto. Pro manko de sperto, oni rikoltis nur 13.5 ĝinojn da sensemigita kotono en ĉiu muo. Tiam, iuj perdis fidon pri kulturado de kotono sur montsupro kaj volis ĉesigi la provadon. Sed malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris, ke kvankam oni akiris pomuan rikolton de nur dek kelkaj ĝinoj en la unua provo, tamen oni jam rompis la superstiĉan kredon, ke oni ne povas kulturi kotonon surmonte. Se kotonon oni povas kreskigi tie, oni do povas ankaŭ akiri altan produkton. Kaj ili daŭrigis sian provadon.

Observante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "**necesas forte teni la produkton de greno; necesas forte teni la produkton de kotono**", ĝiaj komunumanoj plivastigis la areon de kotonkampoj ĝis 31 muoj en 1967. Por batalakiri altan produkton de kotono, ili ofte iris pli ol 20 liojn al brigadoj, kiuj kulturis kotonon sub la monto por lerni ilian sperton. En la tempo, kiam la kotonplantoj fruktas, sovaĝaj bestoj en la montoj ofte venis por manĝi la fruktojn. La komunumanoj do tagnokte gardis ilin kontraŭ bestaĉoj. En tiu jaro, ili akiris pomuan rikolton de 144 ĝinoj da sensemigita kotono, la unuan altan produkton de kotono sur Keluo-monto.

En 1969, tie okazis serioza sekeco, kiu alportis grandan malfacilon al la kulturado de kotono. Prenante la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de Daĝaj kiel modelon, la komunumanoj peneme batalis en malfaciloj kontraŭ la natura katastrofo. Ili vektoportis akvon al la kampoj por akvumi la enterigitan semon kaj plantidojn. En la komenco, ili devis iri 1-2 liojn por preni akvon, poste 3-4 liojn kaj fine eĉ 7-8 liojn. Pli kaj pli malfacila fariĝis la akiro de akvo. Precipe en julio kaj aŭgusto, kiam la vetero estis varmega kaj la fruktantaj kotonplantoj bezonis grandan kvanton da akvo vektoportado de akvo jam ne povis kontentigi la bezonon. La folioj de la plantoj preskaŭ velkis. Tiam la gvidanta grupo de la brigado mobilizis la amasojn por levi ankoraŭ

*Atenta prizorgo al kotonaj kampoj*





*Komunumanoj de la Daantoŭ-a Produkta Brigado aktive vendas nove rikoltitan kotonon al la ŝtato.*

pli grandskalan tajdon de batalo kontraŭ sekeco kaj mallongigis la intertempojn de akvumado de 10 tagoj al 7 aŭ 5 tagoj. Dank' al la penado, ili venkis la grandan sekecon kaj akiris relative bonan rikolton de pomua produktokvanto de 92 ĝinoj.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daantoŭ-brigado konvinkiĝis el sia praktikado, ke oni devas kombini revolucian spiriton kun scienca sinteno, por batalakiri altan produkton de kotono. Ili serioze studis la brilajn filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ, trovis la sciencan metodon de terkulturado konforman al la lokaj kondiĉoj, kaj rompis superstiĉajn kredojn, tra praktikado, konado, denove praktikado kaj denove konado.

En la komenca periodo de kulturado de kotono, ili nur faris tion kun fervorego, imitante la manierojn de aliaj. Aliaj konservis 3-4 mil kotonplantidojn en ĉiu muo da tero kaj derompis la pinton de la ĉefa trunko de la plantoj en la unua tagdeko de julio, do ankaŭ ili tiel faris same. Rezulte, ĉiu kotonplanto de alia brigado havis pli ol dek fruktoportantajn branĉojn, dense kovrante la teron, dum la iliaj havis nur po 3-4 tiajn branĉojn kaj montris sin maldense malprosperaj en la kampo. En aŭtuno, ili rikoltis nur dek kelkajn ĝinojn da kotono en ĉiu muo. Ili eltiris lecionon el la malsukceso. La gvidanta grupo de la brigado organizis la komunumanojn por studi la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj serioze analizi la kaŭzon de la malsukceso kaj ekkonis, ke la sperto de kotonkulturado de la frata brigado sub la monto konformas al la lokaj naturaj kondiĉoj, tial oni ne povas ĝin apliki mekanike tute senŝanĝe sur la monto, sed devas tra praktikado eltrovi sian propran sperton de pliprodukto. Por koni la leĝojn en pliprodukto de kotono sur monto, la brigado organizis sciencan esploran grupon kombinitan el spertaj kamparanoj, intelektaj junuloj kaj kadroj por solvi la problemon. En 1967, ili rompis la antaŭan rutinan regulon kaj pliigis la nombron de kotonplantoj en ĉiu muo de 4-5 mil ĝis 8-10 mil. Kaj rezulte de tio, ili akiris altan produkton.

Kial densa plantado alportis pliprodukton? Ili serioze resumis sian sperton de tiu sukceso kaj ekkonis, ke malsamaj estas la kondiĉoj sur monto alta je pli ol mil metroj super la marnivelo ol tiuj sur la ebenejo sub la monto en kulturado de kotono. Surmonte la grundtavolo estas maldika, la irigacio malfacila, kaj la senprujna periodo mallonga, tial multaj aŭtunaj fruktoj ofte ne povas maturiĝi — ĉio ĉi tio estas malfavoraj faktoroj. Sed la kampoj sur la monto estas malgrandaj kaj la aeruma kaj sunuma kondiĉoj estas sufiĉe bonaj. Tial, racie densa plantado estas efika aranĝo por plene utiligi la favorajn kondiĉojn kaj venki la malfavorajn. Poste, ili pligrandigis la nombron de kotonplantidoj en ĉiu muo ĝis 13-14 mil kaj atingis meznombran pomuan produktokvanton de sensemigita kotono de 155 ĝinoj. Daantoŭ-brigado, kies antaŭe bezonata kotono estis provizita de la ŝtato, nun ne nur povas produkti sufiĉe da kotono por kontentigi sian propran bezonon, sed en 1970 eĉ liveris al la ŝtato meznombre 25 ĝinojn da sensemigita kotono po brigadano. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris ĝoje: "Nia scienca kulturado de kampoj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ebligas al ni riĉan rikolton de kotono eĉ sur alta monto."

# La Partia Filio de Ŝaŭŝan



En la supra etaĝo de sia loĝejo, Prezidanto Maŭ siatempe fondis la partian filion de Ŝaŭŝan.

Ŝaŭŝan estas la hejmloko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu persone fondis tie la unuan partian filion en nia kamparo, 1925.

De kelkdek jaroj, sub gvido de la ŝaŭŝan-a partia filio la heroaj ŝaŭŝan-anoj brave kaj persisteme faris senkompare malfacilajn batalojn kontraŭ la kuomintanga reakciularo kaj la japana imperiismo, kaj pli ol 30 eminentaj partianoj oferis, unuj post aliaj, sian karan vivon por la revolucio.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, la partia filio de Ŝaŭŝan gvidis la partianojn kaj amasojn en organizado de interhelpaj grupoj kaj fondo de popola komunumo kaj grandpaŝe marŝas antaŭen sur la socialisma vojo!

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, laŭ la partio-konstrua penso de Prezidanto Maŭ, la partia filio ordigis kaj konstruis sian organizon, kaj akceptis en sin avangardajn elementojn harditajn en la Granda Proletara Kultura Revolucio, tiel ke ĝi fariĝis pli viglecplena avangarda organizo. Ĝi forte tenas la klasan batalon kaj senĉese kritikas la burĝaron, tenante la revolucion kaj stimulante produkton, tiel ke ĝi akiris grandajn riĉrikoltojn de greno en sinsekvaj jaroj.

La sekretario de la partia filio kamarado Maŭ Dikiu (dekstre) ĉiam staras sur la plejfronto de agrikultura produkto.






La filia vicsekretario kamarado Zoŭ Ŝunfu (meze) rakontas al gelernantoj la grandan revolucian praktikon de Prezidanto Maŭ por kulturi daŭrigantojn de la revolucia afero de la proletaro.



La filia vicsekretario kamaradino Liu Hiuhua (dekstre) kaj "nudpieda kuracistino" kolektas kuracherbojn sur montoj kontribuante sian forton por bone entrepreni la kooperan kuracon.

Dekstre: La partiano kaj antaŭa ruĝa gvardiano kamarado Maŭ Ĝaŭkiu (dekstre) faras al milicanoj edukon de revolucia tradicio.


Partiano kamarado He Junĉeng (meze) flegas rizplantidojn kune kun komunumanoj.












Virinaj komunumanoj rikoltas tefoliojn.




Supre maldekstre:
Kamarado Maŭ Zevu, partiano kaj milicano kun kvin bonoj, helpas milicaninon en ekzercado de pafo.

La kamparo de la Ŝaŭŝan-a Brigado flegata kvazaŭ ĝardeno



Akvoutiliga konstruado por reformo de la naturo

## Esperantaj Libroj:

# Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong

### Volumo I

En la volumo estas kolektitaj 17 artikoloj de kamarado Maŭ Zedong skribitaj en la periodoj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) kaj la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937).

*622 pĝ. 10 × 15 cm. kun ruĝa plasta kovrilo*

# STATUTO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO

**(Aprobita de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en la 14-a de aprilo, 1969)**

*34 pĝ. 10.5 × 7.3 cm. kun ruĝa plasta kovrilo*

*Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio*
*Distribuas la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo*

Aĉetu ilin ĉe lokaj perantoj aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

La du libroj estas eldonitaj ankaŭ en diversaj naciaj lingvoj. Aĉetu ilin ĉe Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio aŭ rekte ĉe la diverslandaj librovendejoj.




### TUNELA SKRAPMAŜINO

Naskiĝis lastatempe en Ŝanhajo, speco de granda tunela skrapmaŝino, kiu estas projektita kaj fabrikita ĉefe de la Ŝanhaja Fabriko de Maŝinoj por Hidraŭlikaj Konstruaĵoj, en kunlaboro de aliaj institucioj.

La nova maŝino skrapas kontinue roksurfacon per turniĝanta granda ŝtaldiskego provizita per skrapelstaraĵoj kaj per tio paŝo post paŝo formi tunelon kun certigita kvalito kaj sekureco. Ĝia uzado en konstruado de minejoj kaj fervojaj tuneloj povas multe rapidigi la konstruadon kaj plibonigi la laborkondiĉojn.

### SOLIDA AMONIA HUMATO FABRIKITA EL SENUTILA LIKVAĴO DE PAPERFABRIKO


La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la paperfabriko Hian-gju, Ĝegiang-provinco, sukcesis elfari novan sterkon el forĵetita likvaĵo de paperfabriko, nome solidan amonian humaton.

Solida amonia humato estas kompleksa sterko entenanta nitrogenon, fosforon, potason kaj multajn organikaĵojn. Ĝi taŭgas por esti uzata kiel baza kaj aldona sterko por rizo, tritiko, kotono, legomoj, morusarboj, fruktoarboj kaj aliaj agrikulturaj plantoj. Ĝi karakteriziĝas per la povoj de longa efiko, plibonigo de grundo, ekstermo de fiinsektoj kaj prevento de malsanoj de plantoj. Ĝia karaktero estas stabila. Ĝi estas facile konservebla kaj transportebla kaj pro tio estas tre bonvena al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

### NOVA MEKANIKE MOVATA TIRLEVMAŜINO

Laboristoj kaj teknikistoj de la Instala Kompanio por Mekanikaj kaj Elektraj Ekipaĵoj de Fugian-provinco sukcesis elfari novan tirlevmaŝinon el nilono kaj vitroŝtalo (plasto plifortigita per vitrofibroj) kaj per tio faris kontribuon al rapidigo de la konstruado de elektroprovizaj sistemoj en montregionoj.

La tuta levmaŝino pezas nur pli ol 40 kilogramojn kaj povas levi pezon de 1 tuno. Ĝi estas simpla en strukturo, facile manipulebla kaj fabrikebla sen metalo.



*Laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Optikaj Instrumentoj sukcesis fabriki universalan projekcian mikroskopon por instrumentoj. Ĝi estas malgranda kaj malpeza kaj povas kontroli la longecon kaj angulon de diversaj maŝinpecoj.*

# Solena Memorigo en Pjongjang pri la 11-a Datreveno de la Leviĝo de la 19-a de Aprilo

EN la 18-a de aprilo, 1971, raporta mitingo estis okazigita en Pjongjang por solene memorigi la 11-an datrevenon de la leviĝo de la sudkorea popolo je la 19-a de aprilo.

La raportan mitingon ĉeestis kamarado So Ĉol; Kan Ljan Uk, prezidanto de la Centra Komitato de la Nordkorea Demokratia Partio; Pak Sin Dok, prezidanto de la Centra Komitato de la Religia Ĉongu-Partio de Koreio; Pek Nam Un, prezidanto de la Plej Alta Popola Asembleo kaj vicprezidanto de la Komitato por la Paca Unuigo de la Patrolando; Ĉoj Von Tek kaj Ko Ĝun Tek, membroj de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Patrolanda Fronto; Sen Seng Pil, ministro de alta eduko; Kim Su Dok, ministro de ordinara eduko; Li Gi Jong, prezidanto de la Centra Komitato de la Ĝenerala Federacio de Literaturaj kaj Artaj Unioj; Kim Si Hak, prezidanto de la Centra Komitato de la Ligo de Socialismaj Laborantaj Junuloj de Koreio; Ĝen Ĝun Gi, prezidanto de la Centra Komitato de la Korea Ĵurnalista Unio; Sim Ĝej Sen, vicprezidanto de la Ĝenerala Federacio de Profesiaj Unioj de Koreio; Han Bjong Hi, sekretario de la Pjongjang-a Municipala Komitato de la Labora Partio de Koreio; Li Ĉan In, vicprezidanto de la Pjongjang-a Municipala Popola Komitato; kaj partiaj kaj registaraj institucioj, amasaj organizoj kaj aliaj.

Kim Si Hak faris raporton en la mitingo. Priparolinte la historion kaj la gravan signifon de la Leviĝo de la 19-a de Aprilo, Kim Si Hak montris, ke serioza situacio aperis en suda Koreio hodiaŭ pro la malhumana faŝisma milita regado de la pupa kliko de Pak Ĝen Hi, lakeo de la usona imperiismo, kio vekis senkomparan malamon kaj indignon inter la studentoj kaj popolanoj en suda Koreio, kiuj unuanime sin ĵetis en la kontraŭusonan nacisavan batalon.

En la unua tagdeko de aprilo, sudkoreaj studentoj svarmis sur stratojn kaj faris bravan batalon por oponi kontraŭ la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝen Hi. Kim Si Hak daŭrigis: "En la nomo de ĉiuj studentoj kaj popolanoj en la norda parto de la Respubliko mi esprimas la plej varman subtenon kaj batalan simpation al la studentoj kaj diverstavolaj popolanoj en suda Koreio kiuj aktive respondas al la ĝusta principo pri la sudkorea revolucio kaj la unuigo de la patrolando elmetita de la granda gvidanto kamarado Kim Il Sen, oponas kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia lakeo, la pupa kliko de Pak Ĝen Hi kaj brave batalas por politika libereco kaj rajtoj kaj la sendependeco kaj paca unuigo de la lando.

Kim Si Hak alvokis ĉiujn sudkoreajn studentojn kaj popolanojn kaj ĉiujn patriotajn fortojn de norda kaj suda Koreio unuiĝi kaj unuanime leviĝi en komuna batalo por fini la nacian splitiĝon kaj gajni la unuiĝon, aktive respondante al la apelacio adoptita de la Plej Alta Popola Asembleo al la sudkoreaj samlandanoj. Li esprimis je la fino la konvinkiĝon, ke la batalo de la sudkoreaj studentoj kaj popolanoj kontraŭ la kolonia regado de la usona imperiismo kaj la denova agreso de la japana militarismo kaj por faligi la pupan klikon de Pak Ĝen Hi certe akiros finan venkon.

En la 19-a de aprilo, *Rodong Sinmun* de Koreio publikigis ĉefartikolon, memorigante la 11-an datrevenon de la Leviĝo de la 19-a de Aprilo fare de la sudkorea popolo kaj alvokante la tutan popolon en suda kaj norda Koreio kompakte unuiĝi por konduki tutnacian nacisavan batalon kaj plenumi la historian aferon de la unuigo de la patrolando.

Enciklopedieto

# La Leviĝo de la 19-a de Aprilo Farita de la Sudkorea Popolo

LA 19-a de aprilo de la kuranta jaro estas la 11-a datreveno de la Leviĝo de la 19-a de Aprilo de la sudkorea popolo. En tiu tago antaŭ 11 jaroj, la sudkorea popolo brave leviĝis al batalo kaj faligis Ri Sing Man, lakeon nutratan de la usona imperiismo dum multaj jaroj. La sudkorea popolo akiris gigantan venkon en sia kontraŭusona patriota batalo.

En la 15-a de marto, 1960, por konservi sian faŝisman regadon, la pupa kliko de Ri Sing Man okazigis "baloton" por pupa prezidanto kun helpo de armeanoj kaj policanoj per bajonetoj. Tiu farso de "baloto" prezentita de Ri Sing Man estis firme oponata de la sudkorea popolo. En sama tago, miloj da popolanoj de Masan, suda Koreio, okazigis manifestacion. Tuj poste, kontraŭusonaj patriotaj manifestacioj envolvis diversajn lokojn de suda Koreio.

En la 19-a de aprilo, kelkcent mil popolanoj iris sur stratojn kaj okazigis potencan manifestacion. En Seoul, la manifestaciantaj amasoj sturmis en oficejon de la pupa kabineto kaj "oficejon de ekonomia kunlaboro" de Usono en suda Koreio, sieĝis la pupan parlamenton kaj radiostacion, bruligis la stabejon de la Libera Partio de Ri Sing Man kaj faris bravajn luktojn kun la reakciaj armeanoj kaj policanoj. Ankaŭ en Pusan, Huangĝu kaj Tegu, la manifestaciantaj amasoj detruis reakciajn policejojn kaj aliajn regantajn instituciojn. Sub la peza bato de batalaj fortoj de la sudkorea popolo, ĉiuj membroj de la pupa reĝimo de Ri Sing Man devigite proklamis kolektivan eksiĝon en la 21-a de aprilo. En la 27-a Ri Sing Man mem estis pelita el la potenco.

De 11 jaroj, la spirito de la kontraŭusona patriota batalo en la 19-a de aprilo ĉiam kuraĝigas kaj impulsas la sudkorean popolon en la batalo. En aprilo ĉijare, la sudkorea popolo levis novan altan tajdon de la batalo por oponi kontraŭ la usona imperiismo kaj la pupa kliko de Pak Ĝeng Hi, kiuj perforte devigis studentojn partopreni en milita trejnado, kaj por demokratia rajto. La sudkorea popolo certe akiros la finan venkon en sia batalo.

*Spite al atako per larmiga gaso fare de reakciaj policanoj, studentoj de Seoul faras manifestacion por protesti kontraŭ deviga milita trejnado fare de la Uson-Pak-kliko al la studentoj.*



# Grandaj Manifestacioj en Vaŝingtono kaj San Francisko kontraŭ Agresa Milito

*La manifestaciantaj amasoj kunvenas antaŭ la domo de la usona parlamento por forte protesti kontraŭ la agresa politiko kaj milita politiko de Nixon-registaro.*





*En San Francisko, la manifestaciantaj amasoj postulas ke Nixon-registaro retiru usonajn armitajn fortojn el Sudorienta Azio.*

JE la 24-a de aprilo, en Vaŝingtono kaj San Francisko de Usono eksplodis grandaj manifestacioj kun partopreno de pli ol miliono da popolanoj kontraŭ la agresa milito en Hindoĉinio.

Frumatene de tiu tago, miloj kaj miloj da popolanoj kolektiĝantaj el diversaj lokoj de Usono al Vaŝingtono komencis torenti al la ovala placo proksime de la Blanka Domo. Organizantoj de tiu manifestacio diris, ke la nombro de la partoprenantoj superis 500,000 kaj la manifestacio estas la plej grandskala de sia speco en la historio de Vaŝingtono.

La granda manifestacio komenciĝis je unu horo antaŭ la difinita tempo. La manifestaciantoj marŝis de la placo, tra la avenuo Pennsylvania, torente militiris al la parlamenta domo. Iuj armeanoj en servo, inter kiuj estas armeanoj venintaj de tiel malproksime kiel la bazo de Fort Hood de Texas, marŝis en la frontaj vicoj de la manifestaciantoj, laŭte kriante "Ni ne volas vian militon" kaj aliajn sloganojn. Super la fronta vico flirtis giganta standardo de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto. La manifestaciantoj survoje laŭte kriis senĉese sloganojn kontraŭ la agresa milito, tenante sloganajn tabulojn kondamnantajn la agresemon kaj militemon de Nixon-registaro. Iuj partoprenantoj svingis ruĝajn flagojn, flagojn de la Sudvjetnama Naciliberiga Fronto kaj la Vjetnama Demokratia Respubliko.

Alveninte najbare de la parlamenta domo, la manifestaciaj amasoj tuj ĉirkaŭis ĝin kaj tie okazigis protestan kunvenon de 5 horoj. Parolantoj en la kunveno forte kondamnis la agresan politikon de Nixon-registaro kaj postulis ke ĝi retiru ĉiujn usonajn trupojn el Hindoĉinio.

Atakate de la uragano de la usona popolo kontraŭ agreso, la ĉefurbo de Usono dronis en ĥaoso. La Blanka Domo, la nesto de la usona imperiismo, fermiĝis por unu tuta tago kaj estis severe "gardata" de policanoj. Antaŭvespere de la manifestacio, la ĉefo de la usona imperiismo Nixon jam forfuĝis el Vaŝingtono pro timo. La parlamenta domo estis ĉirkaŭbarita de pikdratoj kaj okazis en ĝi neniu sesio. Ankaŭ plejparto de la institucioj de la federacia registaro ĉesigis laboron.


En San Francisko ĉe la okcidenta bordo de Usono, samtage okazis manifestacio kaj mitingo

kun 300,000 partoprenantoj. La manifestaciaj amasoj marŝis de bordo de la golfo San Francisko je 10 km. kaj kunvenis en la parko Ora Pordego proksime al Pacifiko. La manifestacia kolono etendiĝis sur 41 stratoj. La manifestaciaj amasoj alte tenis sloganajn tabulojn kun la surskriboj: "Nixon — masakristo", "Nixon, vi estas detruanto". Kelkaj manifestaciantoj portis ruĝan bombon el tavoltabulo kun la surskribo "La granda paca plano de Nixon". Ĉ. 20 junuloj en transversa vico alte tenis grandan sloganon: "Ĉiuj usonaj trupoj for el sudorienta Azio". En la protesta mitingo okazigita en la parko oni konkure kondamnis Nixon-registaron, ke ĝi obstine persistas en agresa milito.

La manifestacioj en Vaŝingtono kaj San Francisko montris la senĉesan plivastiĝon de la amasa movado de la usona popolo kontraŭ la agresaj kaj militaj politikoj de Nixon. Inter la manifestaciaj amasoj sin trovis multaj junuloj, maljunuloj kaj knaboj; blankuloj, nigruloj, indianoj kaj usonanoj devenintaj el Latinameriko kaj Azio; studentoj, laboristoj, soldatoj, eksarmeanoj kaj instruistoj, kaj ankaŭ religiuloj kaj entreprenistoj. Iu 66-jara aĝulo, kiu neniam en la pasinteco partoprenis manifestacion kontraŭ agresa milito, diris ke antaŭ partopreno de la batalo li skribis leteron al sia filino studanta en kolegio de Maryland: "Vi zorgu pri Vaŝingtono kaj mi zorgos pri San Francisko." En Vaŝingtono ĉ. 1,000 azianoj-usonanoj iris en la manifestacia kolono, laŭte kriante la sloganojn "Ni ne volas vian rasisman militon" kaj "La (Sudvjetnama) Naciliberiga Fronto certe venkos". En San Francisko 10,000 armeanoj en servo partoprenis la manifestacion.

La usona popolo estas granda. Lenin diris: "**La usona popolo ja havas sian revolucian tradicion.**" Antaŭ pli ol 190 jaroj, kiam la nordamerika kolonio havis nur ĉ. 3,000,000 loĝantojn, ĝi jam kuraĝis preni revolucian standardon kaj fari batalon por sendependeco kaj venkis la t. n. "unuan potencon" — la Grandan Britan Imperion. La usona laboristaro estas la plej granda trupo de la laborista klaso en la mondo. Inter la 22,000,000 usonaj nigruloj la plejparto profunde suferas rasisman diskriminacion kaj klasan ekspluaton kaj estas granda revolucia latenta forto kun plej forta kontraŭstaremo. Ili ĉiuj estas enterigistoj por la usona monopola burĝaro. Tia popolo absolute ne estas kiel dirita de Nixon "silenta en multnombro", ili certe leviĝos por renversi la imperiisman reĝimon kaj teni sian sorton. La popoloj de Ĉinio kaj la mondo metas grandan esperon sur la usonan popolon. Ni firme konvinkiĝis ke la ĉiam pli vekiĝanta usona popolo certe povos akiri sian plenan liberiĝon kaj faros sian novan aktivan kontribuon al la progreso de la homa historio, senĉese hardante sin en batala praktiko, akumulante sperton paŝon post paŝo, koninte kaj posedante la revolucian veron, post ripetadaj bataloj kontraŭ la usonaj reakciuloj kaj batalante kune kun la mondaj popoloj.

*La amasoj de Novjorko kunvenas sur Wall-strato por forte protesti kontraŭ la plivastigo de la agresa milito kontraŭ Hindoĉinio fare de Nixon.*





*Virinoj venintaj el diversaj lokoj de Usono manifestacias antaŭ la Pentagono de Vaŝingtono por protesti kontraŭ la agreso de Nixon-registaro kontraŭ Hindoĉinio.*

## Tra la Mondo

### DEKMILOJ DA POPOLANOJ EN FRANCIO OKAZIGIS MANIFESTACION KAJ MITINGON

En la oka de majo, dekmiloj da francaj laboristoj, studentoj, instruistoj kaj oficistoj kaj laborulaj amasoj de iuj okcidenteŭropaj landoj de Francio okazigis grandiozajn manifestacion kaj mitingon en Parizo, forte protestante kontraŭ la usona imperiismo pro ĝia agresa milito en Hindoĉinio, firme subtenante la vjetnaman, kamboĝan kaj laosan popolojn en ilia justa batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj por nacia savo, kaj firme subtenante la usonan popolon en ĝia brava batalo kontraŭ la agresa kaj milita politiko de Nixon-registaro.


La manifestacianta kolono startis de la Respublika Placo kaj marŝis al la Nacia Placo. En la kolono longa je du kilometroj, la manifestaciantoj tenis pli ol cent slogan-rubandojn kun skribaĵoj "Vivu la batalo de ĉiuj popoloj de Hindoĉinio!" "Nixon, tuj ĉesigu vian malpuran militon!" "For la usonajn imperiistojn el Hindoĉinio!"

Atinginte la Nacian Placon, la manifestaciantoj okazigis mitingon. La ĉeestantoj unuanime aprobis telegramon al la usona popolo, en kiu ili esprimas firman subtenon al ĝi en ĝia brava batalo kontraŭ la agresa milito de la usona imperiismo en Hindoĉinio.

### GRANDIOZA MITINGO OKAZIGITA DE LA POPOLO DE LA ĈEFURBO DE KUBO

Vespere de la kvina de majo, miloj kaj miloj da laboristoj, studentoj kaj popolanoj de aliaj socitavoloj de la ĉefurbo de Kubo okazigis grandiozan mitingon por kondamni la usonan imperiismon pro ĝia agresa milito kontraŭ la hindoĉinia popolo, kaj subteni la usonan popolon en ĝia justa batalo kontraŭ la usona registaro pro ĝia agresa milito en Hindoĉinio.

Hector Ramos, la unua sekretario de la Centra Unio de Laboristoj de Revolucia Kubo faris parolon en la mitingo. Li montris ke la grandskala amasa movado eksplodanta en Usono estas protesto kontraŭ la politiko de "vjetnamigo" elmetita de Nixon, la hodiaŭa Hitler. En la nomo de la Centra Unio de laboristoj de Revolucia Kubo kaj kubaj laboristoj, li esprimis respekton al la kvar studentoj de Kent-universitato mortigitaj de la nacia gardotaĉmento de Usono.




*Francaj metalurgiaj laboristoj manifestacias por subteni la strikon de la aŭtofabrikaj laboristoj.*

*Kubaj popolanoj manifestacias alte tenante sloganojn "Nixon estas murdisto!" kaj aliajn.*



Parolante pri la batalo de la hindoĉiniaj patriotoj, Ramos diris, ke la usonaj agresantoj neniam subigos la heroismon de la tri hindoĉiniaj popoloj.

## MITINGO EN HANOJO POR SUBTENI LA BATALON DE LA USONA POPOLO

Vespere de la 5-a de majo, reprezentantoj de hanojaj intelektuloj okazigis mitingon por forte kondamni Nixon-klikon pro ĝia faŝisma barbaraĵo en kruela persekuto kontraŭ la usona popolo batalanta por paco.

Tran Dang Khoa, vicprezidanto de la Komitato de Batalo kontraŭ la Persekuto al Sudvjetnamaj Intelektuloj Fare de la Uson-Pupa Kliko, faris parolon en la mitingo. Li varme laŭdis la spiriton de brava batalo de la usona popolo kaj esprimis dankon al ĝi pro ĝiaj simpatio kaj subteno al la justa milito de la vjetnama, laosa kaj kamboĝa popoloj por naciaj sendependeco kaj libereco.

Intelektuloj, kiuj faris parolojn en la mitingo, forte kondamnis la faŝisman barbaraĵon de Nixon-kliko kontraŭleĝe aresti usonajn pacajn batalantojn kaj postulis tujan liberigon de ili.

# Inter Ni

## SKRIBIS AŬSTRIA LEGANTO H. W.

Ĉiuj viaj poŝtaĵoj estas kvazaŭ fenestroj kapabligantaj min rigardi la heroan, revolucian, diligentan, sekve sukcesplenan popolon de Ĉinio. Laŭdinda kaj ĝojiga estas la vojo de tiu popolo for el la jugo de la pasinto sub la vipo de fremdaj kaj enlandaj ekspluatintoj al la socialisma Ĉinio helpe de KPĈ sub la brila suno de Maŭzedongpenso!

Mi gratulas je viaj industria kaj ekonomia progresoj, nome je la konstruado de la granda Nankina Pontego, la artefaritaj tersatelitoj kaj multaj aliaj akiraĵoj laŭ la principo de sinapogo sur propra forto priskribita en EPĈ.

## SKRIBIS SVEDA LEGANTO A. H.

Mi povas mencii por vi, ke viaj reprezentantoj en la tablotenisa konkurso inter Svedio kaj Ĉinio estis tre bonaj sportistoj. Mi vidis la ludon en sveda televido. Tiuj ĉinaj sportistoj donis tre agrablajn impresojn por ni en Svedio. Ni gratulas al Ĉinio por la bonegaj sportistoj. Ili gajnis por sia hejmlando grandan honoron, ĉar ili ne ludis por si mem, sed por sia lando.

Ankaŭ en sveda televido ni vidis ĉinan danctrupon. Estis vere mirinda vido. La dancistinoj estis tiel spertaj. La tukoj ŝvebis en la aero kiel "nordlumo". Mi persone admiris ilin en la danco, kiu estis tiel belega. Vere grandan gratulon al vi. Por mi estas granda ĝojo al vi tion rakonti, ĉar la ambaŭ grupoj estis "ambasadoroj" por la granda Ĉinio.

## SKRIBIS NEDERLANDA LEGANTO R. B.

EPĈ estas tre grava fonto de informado pri via grandega lando kaj eĉ preskaŭ la sola informilo ĉi tie akirebla. Kun ĝojo mi legas pri viaj kolektivaj fortostreĉoj kaj sukcesoj por ŝanĝi vian landon en prosperan vaste industriigitan landon. Eĉ la malamikoj devas rekoni, ke tia giganta tasko nur povas plenumiĝi sub la gloraj standardoj de la ĉina kompartio kaj ĝiaj gvidantoj amase apogataj de via laborema kaj diligenta popolo.

En februaro kaj marto okazis en la ĉi-urba teknika altlernejo serio da prelegoj pri popola Ĉinio organizita de la studenta unuiĝo. Krome oni montris diapozitivojn, vendis afiŝojn kaj broŝurojn kaj en la aŭlo de la universitato estis ampleksa fotoekspozicio. Por mi kiel esperantisto kaj leganto de EPĈ ili ne rakontis multe da novaĵoj, sed al la teknikaj studentoj ĉi ĉio certe efikis okulmalfermiga. Tre koncize la prelegintoj venis al la jenaj konkludoj: En Ĉinio ne plu estas malsato, ne plu estas korupto, ne plu analfabetoj sub la 40-a jaraĝo, ne plu grandegaj inundaj katastrofoj, ne plu almozpetantoj, ne plu ŝtataj ŝuldoj, ktp. ktp. Ĉiuj tiuj "ne plu-oj" signifas per si mem jam grandegajn paŝojn antaŭen. Rimarkinda afero estas, ke neniu preleginto diris ion malbonan pri via lando kaj la donita informado laŭ mi estis objektiva kaj realeca.

## SKRIBIS ALBANA LEGANTO B.

Ĉiuj viaj libroj, broŝuroj, albumoj k. s. estas bonkvalitaj kaj veraj informiloj pri vivo de Ĉinio. Ankaŭ miaj pluraj geamikoj fojon post fojo legis ilin kun plena intereso laŭ mia rekomendo.

Mi konstante informiĝis pere de EPĈ pri viaj plej novaj esp. eldonaĵoj.

Mi instruas filozofion al studentoj en universitato. Tial, kompreneble, mi plej ŝatus havigi al mi kompletajn esp. verkojn (en kvar volumoj) de Prezidanto Maŭ. Ĉu vi povus traduki en Esperanton tiujn librojn kiaj "Konciza Historio de Ĉinio", "Konciza Historio de Ĉina Filozofio" publikigitaj en aliaj lingvoj? Mi deziras al vi pluajn sukcesojn en via laboro.




# Nova Sekretario kaj Veterana Laboristo

LA partia komitato de la Dent-rada Fabriko decidis, ke k-dino Hiang Taŭ estu sekretario de la partia filio de la maŝin-riparejo. Aŭdinte tion, majstro Li, la respondeculo de la riparejo tiel ĝojiĝis, ke li diris al ĉiuj kiujn li renkontis: "Hiang Taŭ revenos al sia 'patrina domo'!"

Hiang Taŭ estas veldistino instruita de majstro Li. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj elektis ŝin en gvidantaron de la fabriko.

Hiang Taŭ venis al la nova posteno. Majstro Li ĝoje kondukis ŝin en la oficejon de la riparejo kaj prezentis al ŝi la novan taskon de la laborejo en la kampanjo "Produkti plimulte da dent-radoj por pli-multe da traktoroj".

Rigardante la grizan hararon de majstro Li, Hiang Taŭ diris pretervole kun respekto: "Majstro, vi aspektas multe pli maljuna kompare kun la pasintaj kelkaj jaroj!"

"Ho ne, ho ne! Mi ankoraŭ povos labori dekojn da jaroj por la socialismo!" Majstro Li ekridegis serene.

"Oni tamen ne devas nur profundiĝi en laboroj kiel tiri ĉaron kun klinita kapo kaj ne pririgardi la iratan vojon!" Hiang Taŭ diris humure.

"Vojon? Dank' al la granda kultura revolucio, ni jam konas la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Mi ne misiros eĉ kun fermitaj okuloj!"

Tion aŭdinte, Hiang Taŭ surpriziĝis kaj sentis ke io malprava kuŝas en liaj vortoj.

Tiam, la pordo subite malfermiĝis, veldisto malgranda Ĉen envenis kun malnova dent-rado en sia mano. Li diris al majstro Li:

"Majstro Li, difektiĝis dent-rado de traktoro de Ŝengli-brigado, kaj oni petas nin veldi ĝin."

Majstro Li kuntiris siajn brovojn kaj diris: "Urĝaj taskoj amasiĝas nun ĉe ni, petu ilin sin turni al aliaj por helpo!" Tion dirinte, li tuj sinokupis pri montrado de desegnoj de dent-radoj al Hiang Taŭ. Malgranda Ĉen do povis fari nenion alian ol foriri.

El la okazintaĵo Hiang Taŭ vidis malĝustaĵon ĉe majstro Li kaj diris al li: "Servi al agrikulturo ja estas nia tasko. Do lasu malgrandan Ĉen veldi por ili."

Ĉe tio malgranda Ĉen envenis denove. Kaj lin sekvis juna kamparano. En-irinte en la ĉambron, la junulo tuj diris:

"Majstro, nun estas sezono de printempa plugado. Centoj da kampoj atendas plugadon. Tamen difektiĝis ĝuste nun dent-rado de nia traktoro! Kia akcidento!. . ."

"Ne maltrankviliĝu, ni klopodos por vin helpi." Lin konsolis Hiang Taŭ.

Sed majstro Li diris: "Kamarado, vi venis malbon-ŝance. Estas ĉe ni nur unu veldisto malgranda Ĉen, kaj ni havas multegon da laboroj pri fabrikado de dent-radoj."

Hiang Taŭ inter-rompis: "Novajn dent-radojn ni fabrikos, kaj ankaŭ malnovajn dent-radojn ni riparos. Ni devas agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: preni agrikulturon kiel fundamenton kaj transigi nian laboron sur tiun ĉi trakon."

Majstro Li diris nenion kaj komencis fumadi silente. Hiang Taŭ faris okul-signon al malgranda Ĉen, kaj tiu ĉi foriris tirante la junulon.

Hiang Taŭ pensis, ke ŝi devas montri la eraran penson de majstro Li, por helpi lin daŭre antaŭen-marŝi sur revolucia vojo. Ŝi diris al li kun rideto:

"En malgranda afero kuŝas grava principo. Ĉu ni helpas la malriĉ-kamparanojn kaj malsuperajn mez-kamparanojn aŭ ne, kiam ili havas malfacilojn, ja koncernas la problemon de linio! En la pasinteco, renegato Liu Ŝaŭki distrumpetis pri 'unue la produkto' kaj 'profesia laboro en komando', por restaŭri kapitalismon. Hodiaŭ, kiam la Partio kaj la popolo lasas nin teni la regpotencon, ni ja ne devas iri la malnovan vojon!"

La trafaj vortoj de Hiang Taŭ malfermis fenestron al la penso de majstro Li. Li diris kun subita lumiĝo en la penso: "Prave vi diris."

Ili ambaŭ venis en la laborejon. Majstro Li vidis, ke malgranda Ĉen sin okupas pri veldado de la difektita dent-rado. Kun rideto li trans-prenis el lia mano la veldilon, sur-metis vizaĝ-ŝirmilon kaj daŭrigis la veldadon. La fulmanta lumarko jen kaj jen briligis la ridantajn vizaĝojn de Hiang Taŭ kaj malgranda Ĉen. La maltrankvilo de la juna kamparano tute malaperis.

*Sur la Kovrilo;*

Kamarado Maŭ Dikiu, sekretario de la partia filio de Ŝaŭŝan-brigado, rakontas al vizitantaj junuloj la revolucian praktikon de Prezidanto Maŭ en starigo de la partia filio de Ŝaŭŝan — la unua filio de la Komunista Partio de Ĉinio en nia kamparo.

*Sur la Dorskovrilo;*

La Muzeo de la Kantona Instituto de Kamparana Movado fondita de kamarado Maŭ Zedong


# EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**

**P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 7 (156) 1971**


## Ĉefa Enhavo


Historia Turnopunkto

Ĉiam Brilas la Spirito de Jan-an

La Viglecplena Partia Filio de Daĝaj

Elstara Kompartiano Luo Majŝeng

Senvelka Revolucia Spirito

Vicprofesoro Ĝang Ŝimej en la Kamparo

Vizito al la Familio de Tibeta Laboristo

Daj Hiangmej Nun Scipovas Apliki Dialektikon

Lerni Unu de Alia, Akceli la Amikecon

Fremdlandaj Maristoj en Ĉinio

Impetas la Gilin-a Termoelektrejo

Ministoj en Pasinteco kaj Nuno

Riĉa Rikolto de Kotono sur Montsupro

Solena Memorigo en Pjongjang pri la 11-a Datreveno de la Leviĝo de la 19-a de Aprilo


La Leviĝo de la 19-a de Aprilo Farita de la Sudkorea Popolo


Grandaj Manifestacioj en Vaŝingtono kaj San Francisko kontraŭ Agresa Milito

# Nova Fizionomio de Industria Produkto


Ŝtalaj laboristoj de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio strebas al plenumo kaj superplenumo de ĉijara produkta plano.







Laboristoj de la Ŝanhaja Olea Rafinejo muntas sorboturon de kataliza krakigo uzotan por sinteza utiligo de petrolo.



Laboristoj de la Nanŝan-a Fer-minejo de la Maanŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio sukcesis mem fari ekipajon por ercolavado.




aboristoj de la Luojang-a
Iin-maŝina Fabriko urĝe faras
v-ekipaĵon.

Caj Hjueĵong (meze) kaj Giang Erbin (maldekstre), teknikistoj de la Ŝanhaja Unua Fridigila Fabriko, kiuj kune kun veteranaj laboristoj mem projektis, fabrikis kaj muntis akrilan turbinan fridigilon de granda tipo.



La Hongtoŭŝan-a Kupro-minejo de Liaŭning energie renovigis siajn ekipaĵojn kaj tiel pliigis la produktan kvanton 1.5-oble.






Laboristoj de la Handan-a Metalurgia kaj Mina Kompanio ŝarĝas vagonetaron per erco.

La Baŭding-a Ĥemifibra Fabriko efektivigis altan produkton kaj bonan kvaliton kaj malaltan konsumon de krudmaterialo ekde januaro ĉijare. Jen la laboristinoj ekzamenas kvaliton de produktaĵoj.





Dizeloj de la tipo 195 produktitaj de la Jantaj-a Agrikultur-maŝina Fabriko de Ŝandong-provinco.



世界語《人民中国报道》一九七一年第七期（本刊代号二——九